# BAKUNIN



# *ELEKTO DE TEKSTOJ [1867–1873]*

Esperantigo : D.C.

SAT-Broŝurservo - Laŭte!
Cercle espérantiste de l'Agenais
F 47340 Laroque Timbaut ⁞ 1983 ⁞ 10 FF

Io granda estas en Bakunin. Iu komunikiva varmeco, pro kio oni multe amis lin vivanta, pro kio jam de la unua tago mi enamiĝis al li, kion mi deziras al vi ankaŭ.

François Munoz.

# E N H A V O


I . LA HOMOJ KAJ LA LIBERECO 7

1 - La homo konkeras sian homecon, asertante kaj realigante sian liberecon en la mondo 7
2 - Enradikiĝo kaj libereco de la individuo en la socio 9
3 - La libereco estas antaŭ ĉio socia fakto. Alies libereco etendas la mian senfine 13
4 - Ŝtato kaj libereco 15
5 - Libereco kaj regado de la plej bonaj : virtaj homoj, kleruloj Scienco kaj vivo 19
6 - Patrio, naciismo, libereco 27

II SOCIALISMO KAJ REVOLUCIO 31

1 - Sindikata burokratismo
La personoj kaj la principoj 33
2 - La iluzioj de la ĝenerala balotado 34
3 - La libereco en la "popola Ŝtato" 37
4 - Revolucia moralo 40
5 - Ĉu detrui ? 41
6 - Ni ne leĝodonu 41
7 - Abolicio de la Ŝtato
Abolicio de la heredrajto 42
8 - Familio laŭleĝa kaj familio natura 45
9 - Libereco de la kultoj 46
10 - Individuaj rajtoj 46
11 - Rajtoj de la asocioj 49
12 - Organizado de la komunumoj, provincoj kaj nacioj. La komunumo mezepoka kaj la komunumo moderna 50

III LA BURĜARO KAJ LA SABRA REĜIMO 57

# I

# LA HOMOJ KAJ LA LIBERECO

## 1 - La homo konkeras sian homecon asertante kaj realigante sian liberecon en la mondo.

Ĉio vivanta... strebas al kompleta plenumiĝo de sia esto. Por plenumiĝi, la homo, estaĵo samtempe vivanta kaj pensanta, devas unue sin koni mem.

Kio do estas tiu nerezistebla scivoleco, kiu puŝas la homon ekkoni la ĉirkaŭan mondon, serĉadi kun nelacigebla pasio la sekretojn de la naturo, kies lasta kaj plej perfekta kreaĵo li mem estas sur tiu nia Tero ?... Mi ne hezitas diri, ke, el ĉiuj necesecoj konsistigantaj la naturon de l'homo, ĝi estas la plej homa ; ke la homo efektive distingiĝas el la aliaj animaloj ĉiaspecaj nur per tiu nekvietigebla sciobezono ; ke li reale kaj plene fariĝas homo nur pro la vekiĝo kaj la iompostioma kontentigo de tiu ega sciobezono. Por kompleta plenumiĝo de sia esto, la homo devas sin ekkoni, kaj li neniam plene kaj reale sin konos, tiom longe dum li ne estos koninta la lin envolvantan naturon, kies produktaĵo li estas. Krom se rezigni sian homecon, la homo devas scii, li devas perpense penetri la tutan realan mondon, kaj sen esperi iam atingi ties fundon, li devas plue pliprofundigi ties kunordigon kaj leĝojn, ĉar estas tiupreza lia homeco... por ke li povu kompreni sian propran naturon kaj sian mision sur la Tero, tiu sia patrio kaj unika teatro ; por ke en tiu blindfatala mondo li povu inaŭguri sian humanan mondon, la mondon liberecan.

Tia estas la homa tasko : ĝi estas neelĉerpebla, ĝi estas senfina kaj ja sufiĉa por kontentigi la spiritojn kaj korojn plej fierajn kaj plej ambiciajn. Estaĵo efemera kaj neperceptebla, perdita meze de la senborda oceano el universala transformiĝo, kun nekonita eterneco malantaŭ si kaj antaŭ si vastega eterneco, la homo pensanta, la homo aktiva, la homo konscia pri sia homeca destino restas kvieta kaj fiera en la percepto de sia libereco, kiun li konkeras, sin emancipante per la laboro, la scienco, kaj

emancipante, se bezone ribeligante ĉirkaŭ si, ĉiujn homojn, siajn samulojn, siajn homfratojn.

""""""

Tiom malvasta kompare kun nia Universo, nia terglobo tamen estas senfina mondo. Ĉi-rilate oni povas diri, ke ankaŭ nia mondo, nia Tero estas nepenetrebla, t.e. neelĉerpebla. Neniam la scienco atingos la lastan limon, nek diros sian lastan vorton. Ĉu tio nin senesperigu ? Male, se la tasko estus limigita, ĝi baldaŭ malvarmigus la spiriton de l'homo, kiu, unu fojon por ĉiam, kion ajn oni diru, kion ajn oni faru, sentas sin plej feliĉa, kiam li povas detrui kaj transpasi limon.

... armita per sia eksterordinara abstraktokapablo, li ne agnoskas kaj neniam agnoskos ian limon al sia nerezistebla, pasia scivoleco avida ĉion scii kaj ĉirkaŭpreni. Sufiĉas diri al li : "Ci ne iru transen", por ke per la tuta potenco de tiu scivoleco incitita de la obstaklo, li emu impeti transen..... La homo ĉiam realigis kaj ekkonis la eblon, serĉante la neeblon, kaj kiuj "saĝe" limigis sin al laŭŝajna eblo, tiuj neniam antaŭeniris eĉ per unu sola paŝo.

""""""

... la spirito de l'homo kaj ties volo ne plu prezentiĝas kiel potencoj absolute aŭtonomaj, sendependaj de la materia mondo kaj - kreante jen pensojn, jen spontanajn agojn - kapablaj rompi la fatalan kunĉenadon de la efikoj kaj kaŭzoj, kiuj konsistigas la universalan solidarecon de la mondoj... Kaj same kiel ni devas forĵeti la eblecon pri la de la metafizikistoj nomataj "spontanaj ideoj", ni forĵetu ankaŭ la spontanajn volagojn, la "liberan volon" kaj la moralan respondecon de l'homo <u>en la senco teologia</u>, <u>metafizika kaj jura de tiu vorto</u>.

La reala homa individuo estas tiom malmulte universala kaj abstrakta estaĵo, ke ĉiu, ekde kiam ĝi formiĝas en la internaĵoj de sia patrino, jam troviĝas determinita kaj diferencigita per amaso da kaŭzoj kaj agoj.

La volo samkiel la inteligento ne... estas fajrero mistika, senmorta kaj dia, mirakle falinta el la ĉielo

sur la teron por animi pecojn da karno, kadavrojn. Ĝi estas la produkto de la organizita kaj vivanta karno, la produkto de la animala organismo.

°°°

## 2 - Enradikiĝo kaj libereco de la individuo en la socio.

La Ŝtato ne estas la socio, ĝi estas nur ties historia formo same brutala kiel abstrakta. Ĝi historie naskiĝis en ĉiuj landoj el la kuniĝo de la perforto, ŝtelado, rabado, unuvorte de la milito kaj konkero, kun la Dioj laŭvice kreitaj de la teologia fantazio de la nacioj.

La Ŝtato estas historia institucio transira, nedaŭra formo de la socio.

La ribelo estas multe pli facila kontraŭ la Ŝtato, ĉar en ties naturo mem kuŝas io, kiu provokas la ribelon. La Ŝtato estas la aŭtoritato, la forto, ĝi estas la parado, la sinadmiro de la forto. Ĝi ne enŝoviĝas, ĝi ne penas konverti : ĉiufoje kiam ĝi provas, ĝi tion faras tre malvolonte ; ĉar ĝia naturo estas ne persvadi, sed trudiĝi, superforti, kiel ajn ĝi penas por maski tiun sian naturon kiel la laŭleĝan atencanton kontraŭ la volo de la homoj, kiel la konstantan negacion de ties libereco. Eĉ kiam ĝi ordonas fari bonon, ĉi tiun ĝi damaĝas kaj difektas, ĝuste tial, ke ĝi ordonas, kaj ĉia ordono instigas kaj naskas la rajtajn ribelojn de la libereco ; kaj tial, ke la bono, ekde kiam ĝi estas ordonita - laŭ la starpunkto de la vera moralo, de la moralo homa, ne dia, laŭ la starpunkto de la homa respekto kaj de la libereco - fariĝas la malbono. La libereco, la moraleco kaj la homa digno konsistas ĝuste en tio, ke la homo bonfaras ne ĉar tio estas al li ordonita, sed tial ke li tion konceptas, volas kaj amas.

Ne sin trudas la socio precizforme, oficiale, aŭtoritate, ĝi sin trudas nature, kaj ĝuste pro tio ĝia influo super la individuo estas nekompareble pli potenca ol tiu de la ŝtato. Ĝi kreas kaj formas ĉiujn

individuojn, kiuj naskiĝas kaj disvolviĝas en ĝia sino. Ĝi malrapide verŝas en ilin, ekde la unua tago de ilia naskiĝo ĝis ilia morto, sian tutan propran naturon materialan, intelektan kaj moralan, ĝi individuiĝas, se tiel diri, en ĉiu.

"""""

...la natura influo, kiun la homoj reciproke havas unuj sur la aliajn... estas la bazo mem materiala, intelekta kaj morala de la homa solidareco. La homa individuo, produkto de la solidareco, t.e. de la socio, ja povas, restante submetita al ties naturaj leĝoj - sub la influo de elekstere venintaj sentoj kaj nome de fremda socio - kontraŭ ĝi reagi ĝis certa grado, sed li ne povus eksteriĝi el ĝi sen tuj lokiĝi en alia solidara medio kaj tuj tie ricevi novajn influojn.

Ĉar por la homo, vivi ekstere de ĉia socio kaj de ĉiaj homaj influoj, esti absolute izolita, tio estas la morto intelekta, morala kaj ankaŭ materia. La solidareco estas ne la produkto, sed la patrino de la individueco, kaj la homa persono povas naskiĝi kaj disvolviĝi nur en la socio homa.

La leĝo pri socia solidareco estas la unua homa leĝo ; la libereco estas la dua. Tiuj du leĝoj interpenetriĝas kaj, nedisigeblaj, ili konsistigas la esencon de la homeco. Tiel la libereco ne estas la negacio de la solidareco ; male, ĝi estas ties disvolviĝo kaj, se tiel diri, ties homecigo.

Al iu ajn, kiu pretendas, ke la natura agado... super la homamasoj ankoraŭ estas atenco kontraŭ la libereco de tiuj homamasoj, ia provo krei novan aŭtoritatan potencon, ni respondos, ke li estas aŭ sofisto aŭ stultulo. Despli malbone por tiuj, kiuj ignoras la naturan kaj socian leĝon de la solidareco, ĝis imagi, ke la absoluta reciproka sendependeco de la individuoj kaj homamasoj estas io ebla aŭ eĉ dezirinda. Ĝin deziri estas la neniigo mem de la socio, ĉar ĉia socia vivo estas nenio alia krom tiu senĉesa reciproka dependeco de la individuoj kaj homamasoj. Ĉiuj individuoj, eĉ la plej inteligentaj, la plej fortaj, kaj precipe la intelektaj kaj la fortaj, es-

tas ĉiumomente en sia vivo samtempe produktantoj kaj produktoj de la voloj kaj agoj de la homamasoj. La libereco de ĉiu individuo estas la ĉiam denove reproduktata rezulto de tiu kvanto da materialaj, intelektaj kaj moralaj influoj, kiujn havas sur lin ĉiuj ĉirkaŭaj individuoj kaj la socio meze de kiu li naskiĝas, disvolviĝas kaj mortas. Voli eskapi el tiu influo nome de libereco transcenda, dieca, absolute egoista kaj memsufiĉa, tio estas kondamni sin al la neesto ; voli rezigni ĉian influon sur aliulon estas rezigni ĉian prisocian agadon kaj esprimon de siaj penso kaj sentoj ; ankaŭ tio ĉi estas atingi la neeston...

Same en la naturo kiel en la homa socio, kiu estas nenio alia krom tiu naturo mem, ĉio vivanta vivas nur sub tiu nepra kondiĉo ke, plej pozitive kaj tiom potence kiom permesas ĝia naturo, ĝi intervenu en alies vivo. Abolicio de tiu reciproka influo estus do la morto. Kiam ni depostulas la liberecon de la homamasoj, ni neniel pretendas abolicii eĉ unu el la naturaj influoj de ia ajn individuo aŭ de ia ajn grupo da individuoj, kiujn ili havas sur tiujn homamasojn. Kion ni volas, tio estas la abolicio de la artifikaj influoj privilegiitaj, laŭleĝaj, oficialaj. Se la Eklezio kaj la Ŝtato povus esti privataj institucioj, ni sendube estus iliaj kontraŭantoj, sed ni ne protestus kontraŭ ilia ekzistorajto. Sed ni protestas kontraŭ ili tial, ke kvankam ili estas kvazaŭaj privataj institucioj, ĉar ili ekzistas nur por la privata intereso de la privilegiitaj klasoj, ili tamen uzas la kolektivan forton de la homamasoj tiucele organizitaj, por aŭtoritate, oficiale, perforte al ĉi tiuj sin trudi.

La sola granda kaj ĉiopova aŭtoritato samtempe natura kaj racia, la sola kiun ni povos respekti, estos tiu de la kolektiva kaj publika spirito de socio fondita same sur la egaleco kaj solidareco kiel sur la homa kaj reciproka respekto de ĉiuj siaj membroj. Jes, jen aŭtoritato neniel dia, plene homa, sed antaŭ kiu tutkore kliniĝos ni, certaj ke anstataŭ ilin servutigi, ĝi emancipos la homojn. Ĝi es-

tos miloble pli potenca, pri tio ĉi certu, ol ĉiuj viaj diaj, teologiaj, metafizikaj, politikaj kaj juraj aŭtoritatoj starigitaj de la Eklezio kaj Ŝtato, pli potenca ol viaj kriminalaj kodoj, viaj provosoj kaj viaj ekzekutistoj.

La potenco de la kolektiva sento aŭ de la publika spirito estas jam hodiaŭ tre serioza. La homoj plej kapablaj krimi, malofte aŭdacas ĝin defii, ĝin malkaŝe alfronti. Ili provas ĝin trompi, sed ili ja sin gardas ĝin bruski, krom se ili sentas sin apogitaj de ajna minoritato. Neniu homo, tiom potenca li sin kredu, neniam havos la forton elteni unuaniman malŝaton de la socio, neniu povus vivi sen senti sin subtenata de la aprobo kaj estimo de almenaŭ unu ajna parto de tiu socio. Endas, ke homo estu puŝata de grandega kaj ja sincera konvinko por trovi la kuraĝon opinii kaj iri kontraŭ ĉiuj, kaj neniam egoista, korupta kaj malbrava homo havos tian kuraĝon.

Nenio pli bone pruvas la naturan kaj nepran solidarecon - tiun leĝon de societemo - kiu ligas ĉiujn homojn, ol tiu ĉi fakto konstatebla de ĉiu el ni en si mem kaj en la aliaj. Sed se tiu socia potenco ekzistas, kial ĝis nun ĝi ne sufiĉis por moraligi kaj humanigi la homojn ? Al tiu demando la respondo estas tre simpla : ĉar ĝis la hodiaŭo tiu potenco ne estis mem humanigita ; kaj ĝis nun ĝi ne estis humanigita tial, ke la ensocia vivo, kies fidela esprimo ĝi daŭre estas, kiel sciate fondiĝas sur la dia kulto, ne sur la homa respekto ; sur la aŭtoritato, ne sur la libereco ; sur la privilegio, ne sur la egaleco ; sur la ekspluatado, ne sur la interhoma frateco ; sur la maljusteco kaj la mensogo, ne sur la justeco kaj la vero. Konsekvence, ĝia reala agado, ĉiam kontraŭa al la de ĝi deklaritaj teorioj, konstante influis pereige kaj korupte, ne moralece. Ĝi ne malpliigas la malvirtojn kaj la krimojn, ĝi ilin kreas. Sekve, ĝia aŭtoritato estas dia, kontraŭhoma ; ĝia influo estas malbonfara kaj pereiga. Ĉu vi volas igi ilin bonfaraj kaj humanaj ? Faru la socian Revolucion. Faru, ke ĉiuj bezonoj iĝu reale solidaraj, ke ĉies materialaj kaj socialaj interesoj konformiĝu al ĉies homaj devoj. Kaj tiucele

estas nur unu rimedo : detruu ĉiujn instituciojn de la neegaleco ; fondu la ekonomian kaj socialan egalecon por ĉiuj, kaj sur tiu ĉi bazo stariĝos la libereco, la moraleco, la kun ĉiuj solidara homaro.

...la leĝo de socia solidareco estas nepra tiel, ke por moraligi la individuojn, endas zorgi malpli pri ties konscienco ol pri la naturo de ties ensocia ekzisto.

...endas moraligi antaŭ ĉio la socion mem.

° ° °

3 - La libereco estas antaŭ ĉio socia fakto. Alies libereco etendas la mian senfine.

Kio ĉiuj aliaj homoj estas, tre gravas por mi, ĉar kvankam sendependa mi imagas min, aŭ ŝajnas laŭ mia socia pozicio, eĉ se mi estas Papo, Caro aŭ Imperiestro, aŭ eĉ Ĉefministro, mi senĉese estas la produkto de tio, kio estas la lastaj el inter ili ; se ili estas nesciantoj, mizeruloj, sklavoj, mia ekzistado estas determinita de iliaj nescio, mizero kaj sklaveco. Ekzemple mi, klera aŭ inteligenta homo - se tiel estas - stultas pro ilia stulteco ; mi, bravulo, sklaviĝas pro ilia sklaveco ; mi, riĉulo, tremas antaŭ ilia mizero ; mi, privilegiito, paliĝas antaŭ ilia justico. Fine mi, volante esti libera, ne tion povas tial, ke ĉirkaŭ mi ne ĉiuj homoj jam volas esti liberaj, kaj ne ĝin volante, ili fariĝas kontraŭ mi premaj instrumentoj.

Tio ne estas fantazio sed realo, kiun ĉiuj hodiaŭ bedaŭrinde spertadas. Kial, post tiom da superhomaj strečoj, post tiom da unue venkaj revolucioj, post tiom da doloригaj sinoferoj kaj tiom da bataloj por la libereco, Eŭropo ankoraŭ restas sklaveca ? Tial, ke en ĉiuj eŭropaj landoj estas homamaso ankoraŭ senmova, almenaŭ laŭŝajne, kiu ĝis nun restis nepenetrebla de la propagando por la ideoj pri emancipado, humaneco kaj justeco : la kamparanamaso. Tiu ĉi hodiaŭ konsistigas la potencon, la lastan apogon kaj la lastan rifuĝejon de ĉiuj despotoj, veran klabon inter ties manoj por nin dispremi ; kaj tiom longe kiam ni ne penetr-

igos en ĝin niajn aspirojn, pasiojn, ideojn, ni daŭre estos sklavoj. Ni devas ĝin emancipi por emancipi nin mem.

En preskaŭ ĉiuj landoj la virinoj estas sklavoj ; tiom longe kiam ili ne estos plene emancipitaj, nia propra libereco estos neebla.

...Kaj neniu popolo povos esti plene kaj solidare libera, se la tuta homaro tia ne estas.

"""

Mi estas vere libera nur, kiam ĉiuj homaj estaĵoj ĉirkaŭ mi, viroj kaj virinoj, estas egale liberaj... tiel ke, ju pli multnombraj estas ĉirkaŭ mi la liberaj homoj, ju pli profunda kaj larĝa estas ilia libereco, des pli profunda kaj larĝa fariĝas libereco mia... mi povas diri min libera nur, kiam mia libereco aŭ - kio signifas la samon - mia homa digno, mia homa rajto... reflektitaj de ĉies egale libera konscienco, revenas al mi konfirmitaj de ĉies konsento. Mia persona libereco tiel konfirmita de ĉies libereco, etendiĝas senlime.

"""

La libereco de la individuoj ne estas fakto individua, ĝi estas fakto, produkto kolektiva. Neniu homo povus esti libera ekstere de, kaj sen la kunhelpo de la tuta homa socio. La individuistoj aŭ falsaj fratoj, kiujn ni kontraŭbatalis en ĉiuj laboristaj kongresoj, pretendis kun la burĝaj moralistoj kaj ekonomikistoj, ke la homo povas esti libera, ke li povas esti homo ekstere de la socio, dirante, ke la socio estis fondita per libera kontrakto inter homoj antaŭe liberaj.

Tiu teorio proklamita de J.J.Rousseau, verkisto la plej malbonfara en la pasinta jarcento, la sofisto, kiu inspiris ĉiujn burĝajn revoluciulojn, tiu ĉi teorio signas kompletan sensciecon same pri la naturo kiel pri la historio...

...Imagu homon naturdotitan per la plej geniaj kapabloj, ĵetitan jam de sia junaĝo ekstere de ĉia homa socio, en dezerton. Se li ne mizere pereos, kio estas plej probabla, li estos nenio krom brutulo, simio, senigita je parolo kaj penso, - ĉar la penso

estas nedisigebla de la parolo ; neniu povas pensi sen la lingvo... Sed kio estas la parolo ? Ĝi estas la komunikado, ĝi estas la konversacio de homa individuo kun multaj aliaj individuoj. La animala homo transformiĝas en estaĵon homan, t.e. pensantan, nur per tiu ĉi konversacio, nur en tiu ĉi konversacio. Ĝia homa individueco, ĝia libereco estas do la produkto de la kolektivo.

La homo emancipiĝas el la tirana premo sur ĉiun farita de la ekstera naturo, nur per la kolektiva laboro ; ĉar la individua laboro, senpova kaj sterila, neniam povus venki la naturon.

Ĉio homeca en la homo, kaj pli ol ĉio alia la libereco, estas la produkto de socia, kolektiva laboro Esti libera en absoluta izoleco estas absurdaĵo elpensita de la teologoj kaj metafizikistoj.

""""

La homo reale homiĝas nur, kiam ĝi respektas kaj amas la homaron kaj ĉies liberecon, kiam ĝia libereco kaj homeco estas de ĉiuj respektataj, amataj, instigataj kaj kreataj.

° ° °

## 4 - Ŝtato kaj libereco

...Libereco estas nedividebla : oni ne povas depreni unu ĝian parton sen tute mortigi ĝin. Tiu eta parto, kiun vi deprenas, estas la esenco mem de mia libereco, ĝi estas la tuto. Per movo natura, necesa kaj nerezistebla, mia tuta libereco koncentriĝas ĝuste en la parto, kiel ajn eta ĝi estas, kiun vi deprenas. Tio estas la historio de la edzino de Blubarbo, kiu havis je sia dispono tutan palacon kun plena kaj tuta libereco ĉien penetri, ĉion vidi kaj tuŝi, escepte de danĝera ĉambreto, kiun malfermi estis al ŝi malpermesite per la suverena volo de ŝia terura edzo, je mortpuno. Nu, sin deturnante for de ĉiuj grandiozaĵoj, ŝia animo tute koncentriĝis sur tiu danĝera ĉambreto : ŝi ĝin malfermis, kaj ŝi pravis, ĉar tio estis necesa ago de ŝia libereco, dum la malpermeso eniri en la ĉambreton estis nekontest-

eble atenco kontraŭ libereco ŝia. Tio estas la historio pri la peko de Adamo kaj Eva : la malpermeso gustumi la frukton de la sciada arbo sen alia kialo krom tio, ke ĝi estas la volo de la Sinjoro, estis abomene despotisma ago de la Bona Dio ; kaj se niaj unuaj gepatroj estus obeintaj, la tuta homa specio dronus en la plej humiliga sklaveco. Ilia malobeo, male, nin emancipis kaj savis. Tio estis, se konsideri la miton, la unua ago de la libereco homa.

Sed la Ŝtato, diros oni, la demokrata Ŝtato bazita sur la libera voĉdono de ĉiuj civitanoj ne povus esti la negacio de ties libereco ! Kaj kial ne ? Tio ĉi absolute dependos de la misio kaj de la povo, kiujn la civitanoj fordonos al la ŝtato. Respublika ŝtato bazita sur la ĝenerala balotrajto povos esti tre despota, eĉ pli despota ol la monarkia ŝtato, kiam, pretekste de tio, ke ĝi reprezentas ĉies volon, ĝi pezos sur la volo kaj la libera moviĝo de ĉiu el siaj membroj per la tuta forto de sia kolektiva povo.

""""

Ĉia konsekvenca kaj sincera teorio de la ŝtato estas esence fondita sur la aŭtoritata principo, nome sur tiu ideo eminente teologia, metafizika, politika, laŭ kiu la homamasoj ĉiam nekapablaj sin regi mem, devos ĉiutempe subiĝi al la bonfara jugo de saĝeco kaj justeco, kiuj iel aŭ aliel estos al ili trudataj de supre.

La ŝtato, tio estas, fare de ajna minoritato, la regado de supre malsupren super ega kvanto da homoj tre diversaj laŭ la grado de sia kulturo, la naturo de la landoj kaj lokoj kie ili loĝas, laŭ siaj pozicio, okupoj, interesoj kaj aspiroj; tiu minoritato, eĉ milfoje elektita per ĝenerala baloto, en siaj faroj kontrolita de popolaj institucioj, - krom se dotita per ĉiosciado, ĉieestado kaj ĉiopoveco, kiujn la teologoj atribuas al sia Dio - estas en neebleco koni, antaŭvidi ĉies bezonojn, kaj kontentigi kun konstanta justeco ĉies interesojn eĉ la plej rajtajn, la plej urĝajn.

...la kolektiva vivo ne sidas en la popola homomulto ; tiu homomulto, laŭ Mazzini, estas nur tute mekanika agregato el individuoj ; la kolektivo ekzistas

nur en la aŭtoritato kaj povas esti nur de tiu ĉi reprezentita. Ĉiam temas pri tiu plaga funkcio de la ŝtato, kiu englutas kaj en si koncentras, ĝin detruante, la naturan kolektivon popolan, kaj probable ĝuste pro tio ĝuas la famon ĝin reprezenti, kiel Saturno reprezentis siajn filojn laŭmezure kiel ilin li voris.

""""

La ŝtato ĉiam estis la komuna heredhavo de ajna privilegiita klaso : klaso sacerdota, nobela, burĝa; - klaso burokrata fine, kiam, post elĉerpiĝo de ĉiuj aliaj klasoj, la ŝtato falas, - aŭ sin levas, laŭ onia prefero - en la staton de maŝino.

La aŭtoritato, la organizitaj super la homamasoj superrego kaj potenco de la posedantaj kaj laŭdire kleraj klasoj, ĉio ĉi estas la Ŝtato.

Kion ĝi trovas, ĝi ĉiam garantias : al unuj, ilian riĉecon, al la aliaj, ilian malriĉecon ; al unuj, la liberecon bazitan sur la proprieto, al la aliaj, la sklavecon, fatalan konsekvencon de ilia mizero.

""""

...ĉiuj ŝtatoj, de kiam ili ekzistas sur la tero, estas kondamnitaj al ĉiama lukto : lukto kontraŭ la propraj popoloj, kiujn ili subpremas kaj ruinigas, lukto kontraŭ ĉiuj alilandaj ŝtatoj, el kiuj ĉiu estas potenca nur, kondiĉe ke la alia estu malforta ; kaj ĉar ili povas konserviĝi en tiu lukto nur ĉiutage kreskigante sian potencon, - same interne kontraŭ la propraj regatoj kiel ekstere kontraŭ la najbaraj regnoj, - la rezulto estas, ke la plej supera leĝo de la Ŝtato estas la kreskado de ties potenco damaĝe al la interna libereco kaj al la ekstera justeco.

Finfine, eĉ se perfekta estas - laŭ la vidpunkto de la ŝtata konservado - la organizado de la popolaj edukado kaj instruado, de la cenzuro kaj polico, la Ŝtato ne povas certiĝi pri sia ekzisto, dum ĝi ne havas por ĝin defendi kontraŭ la "internaj malamikoj", kontraŭ la malkontento de la popoloj, armilaran forton.

La edukado de tiuj homoj - de la simpla soldato

ĝis la plej altaj gradoj de la militista hierarkio - estas tia, ke ili necese fariĝu la malamikoj de la civila socio kaj de la popolo.

La uniformo, kiun ili surportas kaj kiu tiom memorigas la livreon, ĉiuj ornamaĵoj kaj ridindaj bagatelaĵoj, kiuj distingas la regimentojn kaj gradojn, ĉiuj ĉi infanaj naivaĵoj, kiuj okupas konsiderindan parton de ilia ekzistado, kaj kiuj igus ilin aspekti tiel burleske se ili ne estus minacaj - ĉio ĉi apartigas ilin de la socio pli profunde ol oni opinias. Tiu amuza travestio kaj la mil infanecaj ceremonioj inter kiuj ili pasigas la vivon, aldonitaj al siaj ĉiutagaj ekzercoj, kiuj celas nur la buĉadan kaj detruadan arton, estus profunde humiligaj por homoj, kiuj ne estus perdintaj la senton de homa digno. Ili mortus pro honto, se per sistema ideoperverso ili mem fine ne fierus pri tio. Por ne malestimi sin mem, ili nepre malestimu ĉion, kio ne kuntrenas la sabron kaj ne surportas la militistan livreon. Al ĉio ĉi aldonu plie la morton de ĉia originala penso meze de tiu artifika, rutina ekzistado kaj de tiuj okupoj monotonaj, unuformaj, aŭtomataj, kaj la sufokadon de ĉia individua volo per senkompata disciplino. Ili ĉesas esti homoj por fariĝi soldatoj ; ili estas aŭtomatoj enregimentigitaj, numeritaj kaj puŝitaj de volo fremda. La pasiva obeado estas la plej granda virto, kaj blinda sindono al la mastro, kies aŭtomatoj, sklavoj ili estas, konsistigas ilian tutan honoron. Tio ĉi estas la klimakso de malnobleco.

Submetitaj al despota reglamento, ili fine hororas antaŭ ĉio, kio libere sentas, volas, moviĝas. Ĉia pensulo estas antaŭ iliaj okuloj iu anarkiisto, la postuloj de la libereco estas ribelo, kaj tute nature, iompostiome ili volas trudi al la tuta socio la feran regulon, la brutalan disciplinon, la stultegan ordon, kies viktimoj ili estas mem.

Certe, inter la profesiaj militistoj estas kelkaj inteligentaj, instruitaj homoj, kaj eĉ iafoje, kvankam tre malofte, sincere liberalaj homoj. Sed, mi ĝin jam diris, ili povas esti nur esceptoj, anomalioj tiaj, kiajn oni renkontas en ĉiuspecaj medioj kaj kiuj, kiel diras la proverbo, nur konfirmas la

regulon. Inteligenta militisto, kiu ne kontentiĝas per la ideoj al li liveritaj de la militaj scienco kaj moralo, verŝajne sufokiĝas en la malvasta cirklo el rutino kaj militistaj okupoj. Se li estas reala amanto de la libereco, li devas abomeni la disciplinon, kiu faras lin sklavo ; se li zorgas pri sia homa digno, li devas tion malestimi, kion oni nomas honoro, kaj kion mi prefere nomos la militista honorsento. Fine, se li estas sincera amiko de sia popolo kaj se li estas inteligenta, klera kaj samtempe honesta rilate sin mem, li devas kompreni, ke pro sia pozicio li estas la plej danĝera, la plej prema kaj la plej ruiniga malamiko de tiu popolo ; sentoj, pensoj kaj tendencoj, kiuj necese faras el li malbonegan militiston. Ĉar por bone plenumi sian oficon oni ĝin respektu kaj amu, kaj oni ne povas ami la militservon sen malamegi la popolon.

""""""

...ni hodiaŭ konkludas al la nepra neceso de detruo de la ŝtatoj, se oni volas ties radikalan kaj kompletan transformadon tiel, ke ĉesante esti regnoj centralizitaj kaj organizitaj de supre malsupren ĉu per la perforto, ĉu per la aŭtoritato de ajna principo, ili reorganiziĝu, - kun absoluta libereco por ĉiuj partoj.

° ° °

5 - Libereco kaj regado de la plej bonaj : virtaj homoj, kleruloj. Scienco kaj vivo.

...kiu povus efektive esti la gardanto kaj efektiviganto de la leĝoj, la defendanto de la justeco kaj de la publika ordo kontraŭ ĉies malbonaj pasioj, kiam ĉiu estas deklarita nekapabla prizorgi sin mem nek bridi kiom estas necese por la komuna savo, sian propran liberecon nature inklinan al la malbono ? - Unuvorte, kiu plenumos la funkciojn de la Ŝtato ?

La plej bonaj civitanoj, diros oni, la plej inteligentaj, la plej virtaj, tiuj kiuj pli bone ol la aliaj komprenos la komunajn interesojn de la

socio kaj la neceson por ĉiu, la devon por ĉiu dependigi de ili ĉiujn privatajn interesojn. Efektive endas, ke tiuj homoj estu tiom inteligentaj kiom virtaj, ĉar se nur inteligentaj sen virto, ili ja povus utiligi la publikan aferon favore al sia privata intereso ; kaj se nur virtaj sen inteligento, ili nepre ĝin ruinigus malgraŭ sia tuta sincereco. Nu, por ke respubliko ne pereu, endas ke ĝi posedu en ĉiuj epokoj sufiĉe konsiderindan nombron da tiaj homoj...

Jen kondiĉo, kiu nek facile nek ofte realiĝas... Ordinare en la sferoj de l'povo regas la senvaloreco, la grizo kaj ofte, kiel ni vidis en la historio, triumfas la nigro kaj ruĝo, t.e. ĉiuj malvirtoj kaj sangama perforto.

Ni supozu, ke en ideala socio, en ĉiu epoko troviĝu sufiĉa nombro da homoj egale inteligentaj kaj virtaj por digne plenumi la precipajn funkciojn de la Ŝtato. Kiu ilin serĉos, kiu ilin trovos, kiu ilin distingos kaj kiu metos en iliajn manojn la ŝtatajn kondukilojn? Ĉu tiujn ĉi ili kaptos mem, konsciante pri la propra inteligento kaj virto, kiel faris du saĝuloj de Grekio, Kleobulo kaj Periandro, al kiuj malgraŭ ties supozita granda saĝo, la Grekoj tamen ligis la abomenan nomon : tiranoj ? Sed kiamaniere ili kaptos la povon ? Ĉu per la persvado, ĉu per la forto ? Se per la unua, ni rimarkigos, ke oni bone persvadas nur je tio, pri kio oni estas mem persvadita, kaj ke ĝuste la plej bonaj homoj estas la malplej konvinkitaj pri sia propra merito ; eĉ se ili ĝin konscias, ili ordinare malinklinas ĝin trudi al la aliaj, dum la malbonaj kaj mezaĉaj homoj, ĉiam kontentaj pri si mem, sentas neniun malinklinon sin glori. Sed ni eĉ supozu, ke la deziro servi la patrion silentigu en tiaj meritplenaj homoj tiun troan modestecon, kaj ke ili sin prezentu mem al la voĉdonado de siaj samcivitanoj, - ĉu ili estos ĉiam akceptataj kaj preferataj al ambiciaj, elokventaj kaj lertaj intrigantoj ? Se male ili volas perforte trudiĝi, unue endas, ke ili disponu sufiĉan forton por venki la rezistadon de tuta partio. Ili atingos la povon per civila milito, post kiu restos partio nerepaciĝinta, sed venkita kaj daŭre malamika. Por al tiu ĉi rezisti, ili devos daŭre uzi la forton. Nu, ne temos pri socio libera sed pri ŝtato despota fondita sur la perforto,

en kiu vi eble trovos multon ŝajne admirindan - sed liberecon, neniam.

Por resti en la fikcio de libera ŝtato rezultanta de socikontrakto, ni do devas supozi, ke la plimulto de la civitanoj ĉiam estos sufiĉe singardaj, klarvidaj kaj justaj por elekti kaj loki ĉekape de la registaro la plej indajn kaj plej kapablajn homojn. Sed por ke popolo montru - ne unu solan fojon kaj nur hazarde, sed en ĉiuj balotoj kaj en sia tuta ekzistodaŭro - tiun klarvidecon, tiun justecon, tiun singardecon, ĉu ne endus, ke ĝi - konsiderata amase - estus atinginta tiel altan gradon de moraleco kaj kulturo, ke ĝi plu bezonus nek registaron nek ŝtaton? Tia popolo povas bezoni nur vivi, malbridante ĉiujn siajn instinktojn : justeco kaj publika ordo nature ŝprucos mem el ĝia vivo, la Ŝtato ĉesos esti la providenco, la kuratoro, la edukisto, la regulilo de la socio, rezignos ĉian subpreman povon, kaj falante en la subalternan rolon al ĝi atribuitan de Prudhon, ĝi plu estos nur aferoficejo, speco de centra kontoro en la servo de la socio.

Sendube, tia politika organizado, aŭ pli verdire tia redukto de la politika agado favore al la libereco de la ensocia vivo, estus granda bonfaro por la socio, sed ĝi neniel kontentigus tiujn, tamen partizanojn de la ŝtato. Ili nepre volas Ŝtato-providencon, Ŝtaton direktantan la socian vivon, disdonantan la justecon, regulantan la publikan ordon. Ili ĝin konfesu al si mem aŭ ne, eĉ se ili sin nomus respublikanoj, demokratoj aŭ eĉ socialistoj, - ili ĉiam bezonas popolon pli-malpli nesciantan, nepienaĝan, nekapablan, aŭ por nomi la aferojn laŭ ties nomo, popolon pli-malpli "kanajlan", por ĝin regi ; eble por ke , perfortante sian neprofitemon kaj modestecon, ili povu konservi la unuajn lokojn por ĉiam trovi la okazon sin dediĉi al la publika afero, kaj sin apogante sur sia virta sindono kaj rara inteligento, kiel privilegiitaj gardantoj de la homa grego ĝin pelante por ties bono, ĝin kondukante al la savo, ili povu samtempe ĝin ankaŭ iomete tondi.

Vi supozu akademion el klerulojn konsistantan el la plej elstaraj reprezentantoj de la scienco ; vi

supozu, ke tiu akademio estu ŝarĝita per la leĝofarado, per la sociorganizado kaj ke, inspirita nur de la plej pura veramo, ĝi faru nur leĝojn absolute konformajn al la plej freŝdataj sciencaj malkovroj. Nu, pretendas mi, tiu leĝaro kaj tiu organizado estus nur monstraĵo pro pluraj kialoj. La unua estas, ke la homa scienco necese estas ĉiam neperfekta, kaj se kompari la malkovritaĵojn kun la malkovrotaĵoj, oni povas diri, ke la scienco ankoraŭ kuŝas en sia lulilo. Tiel ke, se oni volus devigi la praktikan homvivon, tiel kolektivan kiel individuan, strikte, ekskluzive konformiĝi al la lastaj sciencaj donitaĵoj, oni kondamnus same la socion kiel la individuojn al martirsufero sur lito de Prokusto, kiu baldaŭ ilin dispeciĝus kaj sufokus, ĉar la vivo restas ĉiam senlime pli vasta ol la scienco.

La dua kialo estas tiu ĉi : socio, kiu obeus leĝaron emanintan el scienca akademio, ne ĉar ĝi estus mem kompreninta la raciecon de tiu leĝaro, - tiuokaze la akademio fariĝus senutila - sed tial, ke tiu leĝaro sin trudus nome de scienco respektata sed ne komprenata, - tia socio estus ne el homoj, sed el brutuloj. Ĝi estus ripeto de tiu kompatinda respubliko de Paragvajo, kiu tiom longatempe sin lasis regi de la Kompanio de Jesuo. Tia socio nepre baldaŭ falus en la plej malaltan gradon de idioteco.

''''''

Sed estas ankoraŭ tria kialo, kiu igas neebla tian registaron. Ĝi estas, ke scienca akademio investita de tia preskaŭ absoluta suvereneco, eĉ se ĝi konsistus el la plej grandfamaj homoj, nepre kaj baldaŭ sin koruptus mem kaj morale kaj intelekte. Tio estas jam hodiaŭ, malgraŭ la malmulto da privilegioj al ili konsentitaj, la historio de ĉiuj akademioj. La plej granda scienca geniulo, en la momento kiam li fariĝas akademiano, oficiala, agnoskita scienculo, neeviteble defalas kaj endormiĝas. Li perdas sian spontanecon, sian revolucian maltimon kaj tiun neoportunan kaj sovaĝan energion, kiu karakterizas la naturon de la plej grandaj geniuloj, ĉiam alvokitaj detrui la kadukajn mondojn kaj meti la fundamentojn de la mondoj novaj. Laŭmezure kiel li akiras ĝentilecon,

utilecan kaj praktikan saĝecon, li perdas potencon de la penso. Unuvorte li koruptiĝas.

Mortigi la homan spiriton kaj koron estas la propraĵo de la privilegio kaj de ĉia privilegiita pozicio. La homo privilegiita, ĉu politike ĉu ekonomie, estas homo intelekte kaj morale korupta. Jen socia leĝo, kiu allasas nenian escepton, kaj kiu aplikiĝas same al tutaj nacioj kaj al klasoj, kompanioj, individuoj. Ĝi estas la leĝo de egaleco, plej supera kondiĉo de la libereco kaj humaneco. La precipa celo de tiu ĉi libro ĝuste estas ĝin disvolvi kaj demonstri ties veron en ĉiuj manifestadoj de la homa vivo.

Scienca korpuso, al kiu oni konfidus la socian regadon, baldaŭ tute ne plu okupiĝus pri scienco, sed pri tute alia afero, afero de ĉiuj establitaj povoj: eterniĝi, igante la socion konfiditan al ĝia zorgado ĉiam pli stulta kaj sekve pli bezonanta ĝian regadon kaj direktadon.

Sed kio estas vera pri la sciencaj akademioj, tio estas egale vera pri ĉiuj konstituciantaj kaj leĝodonaj asembleoj, eĉ se ili rezultas el la ĝenerala balotado. Vere estas, ke ĉi-lasta povas renovigi la konsiston de la asembleoj, kio ne malhelpas, ke formiĝas en kelkaj jaroj korpuso de politikistoj fakte - ne rajte - privilegiitaj, kiuj, sin dediĉante ekskluzive al la direktado de la publikaj aferoj de iu lando, fine formas specon de politika aristokratio aŭ oligarkio.

''''''

Ĉu el tio sekvas, ke mi forpuŝas ĉian aŭtoritaton ? For de mi tia penso; kiam temas pri botoj, mi min turnas al la aŭtoritato de la ŝuisto ; se temas pri domo, kanalo aŭ fervojo, mi konsultas la arkitekton aŭ inĝenieron. Pri tia speciala scienco mi demandas tian aŭ tian scienculon. Sed mi permesas, ke sin trudu al mi nek la ŝuisto, nek la arkitekto, nek la scienculo. Mi ilin libere aŭskultas kun la tuta respekto, kiun meritas ilia inteligento, ilia karaktero, ilia sciado, tamen rezervante al mi la nekontesteblan rajton de kritiko kaj kontrolo. Mi ne kontentiĝas per konsulto de unu sola fakula aŭto-

ritato, mi konsultas plurajn el ili ; mi komparas iliajn opiniojn kaj tiun mi elektas, kiu ŝajnas la plej ĝusta. Sed mi agnoskas nenian neerareman aŭtoritaton, eĉ pri la tute specialaj demandoj ; konsekvence, eĉ se granda la respekto, kiun mi povas havi por la honesteco kaj sincereco de tia aŭ tia individuo, mi havas absolutan fidon al neniu. Tia fido estus fatala por mia racio, por mia libereco kaj eĉ por la sukceso de miaj entreprenoj ; ĝi tuj transformus min en stultan sklavon, en instrumenton de alies volo kaj interesoj.

Se mi klinas min antaŭ la aŭtoritato de la fakuloj kaj se mi deklaras min preta sekvi - ĝis ia grado kaj dum la tuta tempo kiam tio ŝajnas al mi necesa - iliajn indikojn kaj eĉ direktadon, tio estas ĉar tiu aŭtoritato estas al mi trudita de neniu, nek de homoj nek de Dio. Alie mi forpuŝus ilin kun hororo kaj mi sendus al la diablo iliajn konsilojn, ilian direktadon kaj sciencon, certa, ke ili pagigus al mi per mia libereco kaj mia digno la envolvitajn en multe da mensogoj erojn da homa vero, kiujn ili povus doni al mi.

Mi klinas min antaŭ la aŭtoritato de specialaj homoj, ĉar ĝi estas al mi trudita de mia propra racio. Mi konscias, ke mia kompreno povas ampleksi, en ĉiuj ĝiaj detaloj kaj pozitiva disvolviĝo, nur etan parton de la homa scienco. La plej granda inteligento ne sufiĉus por ampleksi la tuton. El tio rezultas la neceso, same por la scienco kiel por la industrio, de labora divido kaj asociado. Mi ricevas kaj mi donas ; tiela estas la homa vivo. Ĉiu estas direktanta aŭtoritato, kaj ĉiu estas siavice direktata. Do, ne estas fiksa kaj konstanta aŭtoritato, sed daŭra interŝanĝo de reciprokaj, portempaj kaj precipe memvolaj aŭtoritato kaj subordigiteco.

Tiu sama kialo malpermesas al mi agnoski fiksan, konstantan, universalan aŭtoritaton, ĉar ne ekzistas universala homo kapabla kompreni - en tiu detalriĉeco sen kiu aplikado de la scienco al la vivo ne estas ebla - ĉiujn sciencojn, ĉiujn branĉojn de la socia vivo. Kaj se tia universaleco povus iam realiĝi en unu sola homo, kaj se tiu ĉi pro tio preten-

dus trudi al ni sian aŭtoritaton, tiu homo estus elpuŝenda el la socio, ĉar lia aŭtoritato neeviteble reduktus ĉiujn aliajn homojn al sklaveco kaj malsaĝo. Mi ne opinias, ke la socio devas mistrakti la geniulojn, kiel ĝi faris ĝis nun. Sed mi ankaŭ ne opinias, ke ĝi devas ilin tro grasigi, nek precipe konsenti al ili privilegiojn aŭ ajnajn ekskluzivajn rajtojn.

"""""

Ĉu la spirito de la plej granda geniulo sur la tero ne estas ĉiam io alia krom la produkto de la kolektiva laboro, same intelekta kiel industria, de ĉiuj estintaj kaj estantaj generacioj ? Por konvinkiĝi pri tio, oni imagu al si tiun saman geniulon transportita ekde sia plej frua infanaĝo en dezertan insulon ; se supozi, ke li tie ne pereos pro malsato, kio fariĝos el li ? Besto, bruto, kiu ne scios prononci eĉ unu parolon, kiu konsekvence neniam pensos; transportu lin dekjaraĝa en tian insulon ; kio li estos kelkajn jarojn poste ? Same, bruto, kiu estos perdinta la kutimon paroli kaj estos konservinta el sia pasinta homeco nur svagan instinkton. Fine transportu lin tien dudekjara, tridekjara - post dek, dek kvin, dudek jaroj li fariĝos stultega. Eble li inventos novan religion !

Kion pruvas tio ? Ĝi pruvas, ke la plej bone naturdotita homo ricevas nur kapablojn, sed ke tiuj kapabloj restas mortaj, se ili ne estas fekundigitaj de la bonfara kaj potenca agado de la kolektivo. Ni diros eĉ pli : Ju pli la homo estas favorita de la naturo, des pli li prenas de la kolektivo, kaj des pli li devas laŭ la justeco redoni al ĝi.

Tamen ni volonte konsentas, ke, kvankam granda parto de la intelektaj laboroj povas esti pli bone kaj pli rapide farita kolektive ol individue, estas aliaj, kiuj postulas izolecon. Sed kion el tio oni pretendu konkludi ? Ke la izolitaj laboroj de la geniulo aŭ de la talentulo, ĉar pli raraj, pli valoraj kaj pli utilaj ol tiuj de la ordinaraj laboristoj, devas esti pli bone pagataj ol ĉi-lastaj ? Kaj sur kiu bazo, mi petas ? Ĉu tiuj laboroj estas pli penigaj, ol la manlaboroj ? Male, ĉi-lastaj es-

tas senkompare pli penigaj. La intelekta laboro estas plezuriga laboro, kiu kunportas sian rekompencon kaj ne bezonas alian pagon. La intelektulo trovas rekompencon ankaŭ en la estimo kaj danko de la samtempuloj, en la lumo kaj bono, kiujn li alportas al ili. Ĉu vi, kiuj tiel potence kulturas la idealon, sinjoroj burĝaj socialistoj, ne trovas, ke tiu rekompenco ja valoras alian, aŭ ĉu vi preferus salajron pli solidan el mono bone sonanta ?

Cetere, vi estus ja embarasitaj, se vi devus taksi la valoron de la intelektaj geniaj produktoj. Ili estas, kiel Prudhon tion bone observis, nemezureblaj valoroj ; ili neniom kostas, aŭ kostas milionojn.

"""""

Ni tamen esperu, ke la estonta socio trovos en la reale praktika kaj populara organiziĝo de sia kolektiva forto, la rimedon por igi tiujn grandajn geniojn malpli necesaj, malpli premegaj kaj por ĉiuj pli reale bonfaraj. Kaj ni neniam forgesu la profundan parolon de Volter : "Estas iu pli vastaspirita ol la plej grandaj genioj, kaj tiu estas ĉiuj." Restas nur organizi tiun "ĉiuj" per la plej granda libereco fondita sur la plej kompleta egaleco ekonomia, politika kaj socia.

"""""

La inteligento apartigita de la korpa aktiveco nervoziĝas, sensukiĝas, velkas, dum la korpa forto de la homaro, apartigita de la inteligento, stultiĝas, kaj en tiu stato de artefarita apartigo neniu el ili produktas la duonon de tio, kion ĝi povos produkti kiam, kunigitaj en nova sintezo socia, ili formos nur unu solan produktivan forton. Kiam la scienculo laboros, kaj la laborulo pensos, la inteligenta kaj libera laboro estos konsiderata kiel la plej bela gloraĵo de la homaro, kiel la bazo de ties digno, de ties rajto, kiel la manifestiĝo de ties povo sur la tero ; - kaj la homaro estos konstituita.

...en la intereso mem de la laboro kiel en la intereso de la scienco endas, ke estu plu nek laboristoj, nek scienculoj, sed nur homoj.

El tio rezultos, ke la homoj, - kiuj pro sia supera

inteligento hodiaŭ estas logitaj al la sfero ekskluzive scienca, kaj kiuj post instalo en tiu sfero cedas al la neceseco de tute burĝa pozicio kaj igas siajn inventaĵojn utilaj nur por la privilegiita klaso, kies parto ili estas, - kiam ili fariĝos reale de ĉiuj solidaraj ne nur enimage kaj perparole, sed ankaŭ fakte pere de la laboro, tute same necese igos la malkovrojn kaj aplikojn de la scienco utilaj por ĉiuj kaj antaŭ ĉio por faciligo kaj nobligo de la laboro, tiu bazo - la sole rajta kaj la sole reala - de la socio homa.

Tio eble ne malhelpos, ke geniuloj pli bone organizitaj ol la plimulto el siaj samtempuloj por la sciencaj spekulativoj, sin dediĉu pli ekskluzive ol la aliaj al la scienckulturo, kaj faru grandajn servojn al la homaro...

La scienco fariĝante ĉies komuna havo, edziĝos, se tiel diri, kun ĉies tuja kaj reala vivo. Ĝi akiros utilecon kaj gracion, kaj perdos doktrinajn ambicion kaj pedantecon. Ĝi okupos en la vivo la lokon, kiun la kontrapunkto devas okupi, laŭ Betoveno, en la muzikaj komponaĵoj. Al iu, kiu demandis lin, ĉu estas necese scii la kontrapunkton por komponi bonan muzikon : "Sendube, li respondis, estas nepre necese koni la kontrapunkton ; sed estas tute same necese ĝin forgesi, post kiam oni ĝin lernis, se oni volas komponi ion bonan." La kontrapunkto iel formas la ostaron regulan sed perfekte malgracian kaj senaniman de la muzika komponaĵo, kaj kiel tia ĝi devas nepre malaperi sub la spontana kaj vivanta gracio de la arta kreaĵo. Samkiel la kontrapunkto, la scienco ne estas la celo ; ĝi estas nur unu el la plej necesaj kaj plej grandiozaj rimedoj de tiu alia kreaĵo - milóble pli sublima ol ĉiuj artaj komponaĵoj - de la tujaj kaj spontanaj vivo kaj agado de la homaj individuoj en la socio.

° ° °

6 - Patrio, naciismo, libereco.

La Ŝtato ne estas la Patrio ; ĝi estas la abstraktaĵo, la fikcio metafizika, mistika, politika, jura

de la Patrio. La popolamasoj en ĉiuj landoj profunde amas sian patrion ; sed tio estas natura, reala amo ; la popola patriotismo ne estas ideo, sed fakto ; kaj la politika patriotismo, la amo al la Ŝtato ne estas la ĝusta esprimo de tiu fakto, sed esprimo denaturigita per mensoga abstraktaĵo kaj ĉiam profite al ekspluatanta minoritato. La Patrio, la nacieco, samkiel la individueco, estas natura kaj socia fakto, samtempe fiziologia kaj historia ; ĝi ne estas principo. Nur tion oni povas nomi homa principo, kio estas universala, komuna al ĉiuj homoj; sed la nacieco ilin diferencigas : ĝi do ne estas principo. Sed kio estas principo, tio estas la respekto, kiun ĉiu devas havi al la naturaj, realaj aŭ sociaj faktoj. Nu, la nacieco, samkiel la individueco, estas unu el tiuj faktoj. Ni do devas ĝin respekti. Ĝin atenci estas malbonfaro, kaj se paroli kiel Mazzini, ĝi fariĝas sakrala principo ĉiufoje, kiam ĝi estas minacata kaj atencita. Kaj pro tio mi sincere kaj ĉiame sentas min la patrioto de ĉiuj subpremataj patrioj.

La Patrio reprezentas la nekontesteblan kaj sakralan rajton de ĉia homo, de ĉia homa grupo - asocioj, komunumoj, regionoj, nacioj - vivi, senti, pensi, voli kaj agi laŭ sia maniero, kaj tiu maniero ĉiam estas la nekontestebla rezulto de longa historia disvolvado.

Ni do klinas nin antaŭ la tradicio, antaŭ la historio ; aŭ pli ĝuste ni ilin agnoskas, ne ĉar ili prezentiĝas antaŭ ni kiel abstraktaj bariloj metafizike, jure kaj politike starigitaj de plensciaj interpretistoj kaj profesoroj el la pasinteoo, sed nur ĉar ili reale penetris en la sangon kaj karnon, en la realajn pensojn kaj volon de la nuntempaj terloĝantaroj.

Ĉia popolo, ĉia individuo nevole estas tio, kio li estas kaj li nekontesteble rajtas esti si mem...Tamen se la popolo aŭ la individuo ekzistas iamaniere kaj ne povas ekzisti alimaniere, el tio oni neniel povas konkludi, ke ili rajtas aŭ ke al ili utilas konsideri, unu sian nacieco n, la alia sian individuecon kiel ekskluzivajn principojn pri kiuj endus ĉiame zorgi. Male, ju malpli ili zorgos pri si mem, des pli ili penetriĝos de la ĝenerala ideo pri la homaro, des pli ili reviglïĝos internan senton, unu pri sia nacieco, la

alia pri sia individueco.

...patriotoj sendube, sed en la senco la plej humana de tiu vorto, t.e. patriotoj kaj internaciistoj samtempe.

"""""

Tiu laŭdira "nacieca principo" tia, kia ĝi estis en niaj tempoj starigita de la Francia, Rusia kaj Prusia registaroj, kaj eĉ de multaj patriotoj germanaj, polaj, italaj kaj hungaraj, estas nur deturnigo kontraŭmetita de la reakcio antaŭ la revolucia spirito : eminente aristokrata ĝis malestimo al la dialektoj de la nekleraj loĝantaroj, implice neante la liberecon de la provincoj kaj la realan aŭtonomecon de la komunumoj,... - tiu principo esprimas nenion alian krom la pretenditaj historiaj rajtoj kaj ambicio de la ŝtatoj. Do, la rajto pri nacieco povos iam esti konsiderata de la Ligo (°) nur kiel natura konsekvenco de la plej supera principo de libereco, ĉesante esti rajto ekde kiam ĝi stariĝos ĉu kontraŭ la libereco, ĉu eĉ nur ekstere de la libereco.

Unueco estas la celo al kiu nerezisteble tendencas la homaro. Sed ĝi fariĝas fatala, detruiva por la inteligento, digno, prospero de la individuoj kaj popoloj ĉiufoje, kiam ĝi formiĝas ekstere de la libereco, ĉu per la perforto, ĉu sub la aŭtoritato de ajna ideo teologia, metafizika, politika aŭ eĉ ekonomia. Patriotismo, kiu tendencas al unueco ekster la libereco, estas malbona patriotismo, ĉiam pereiga por la popolaj kaj realaj interesoj de la lando, kiun ĝi pretendas gloregi kaj servi, ofte nevola amiko de la reakcio - malamiko de la revolucio, t.e. de la emancipado de l'nacioj kaj homoj. La Ligo povos agnoski nur unu solan unuecon : tiun, kiu libere konstituiĝos per la federiĝo de la aŭtonomaj partoj en la tuto tiel, ke tiu ĉi, ne plu neante la privatajn rajtojn kaj interesojn, ĉesante esti la tombejo, kie devige enteriĝas ĉiuj lokaj prosperoj, male fariĝos la konfirmo kaj la fonto de ĉiuj ĉi aŭtonomioj kaj prosperoj.

° ° °

(°)Ligo : "Ligo de Paco kaj Libero" , asocio de eŭropaj demokratoj celantaj savi la pacon, al kiu anis Bakunin en 1867-68. (Noto de l'kompil.)

# II

# SOCIALISMO KAJ REVOLUCIO

### 1 - Sindikata burokratismo. La personoj kaj la principoj.

La plej bonaj homoj estas facile korupteblaj, precipe kiam la medio mem instigas al korupto de la individuoj pro foresto de serioza kontrolo kaj de konstanta opono. En la Internacio ne povas esti permona korupto, ĉar la asocio estas ankoraŭ tro malriĉa por liveri enspezojn aŭ eĉ justajn pagojn al neniu el siaj ĉefoj... Sed ekzistas alispeca korupto bedaŭrinde ne fremda al la internacia Asocio : ĝi estas tiu de vantemo kaj ambicio.

En ĉiuj homoj kuŝas natura instinkto de komando, kiu fontas el la fundamenta vivleĝo laŭ kiu individuo povas certigi sian ekziston kaj defendi siajn rajtojn nur per la lukto.

Ĉiu portas en si la instinkto-ĝermon, kaj ĉia ĝermo - kiel sciate - devas pro fundamenta vivleĝo necese disvolviĝi kaj kreski, se ĝi nur trovas en sia medio favorajn kondiĉojn. Tiuj kondiĉoj en la homa socio estas la stulteco, la senscieco, la apatia indiferenteco kaj la servutecaj kutimoj de la popolamasoj ; tiel, ke oni povas rajte diri, ke la popolamasoj mem produktas tiujn de la homaro ekspluatantojn, subpremantojn, despotojn, ekzekutistojn, kies viktimoj ili estas. Kiam la homamasoj estas malviglaj kaj pacience elportas sian malnoblecon kaj sklavecon, la plej bonaj homoj naskiĝantaj en ilia sino, la plej inteligentaj, ĝuste tiuj, kiuj povus en malsama medio fari grandegajn servojn al la homaro, neeviteble fariĝas despotoj. Ili tiaj fariĝas ofte sin iluziante pri si mem kaj kredante labori por la bono de tiuj, kiujn ili subpremas. Male, en socio inteligenta, vekkonscienca, liberpostulema kaj preta defendi siajn rajtojn, la individuoj plej egoistaj, plej malbonintencaj, necese fariĝas bonaj. Tia estas la potenco de la socio, miloble pli granda ol tiu de la plej fortaj individuoj.

Nu, estas klare, ke foresto de daŭraj opozicio kaj kontrolo neeviteble fariĝas fonto de koruptado

por ĉiuj individuoj investitaj per ajna socia povo ; ke kiuj inter ili sincere deziras savi sian personan moralecon, tiuj unue zorgu ne tro longatempe konservi tiun povon, poste dum ili ĝin konservas, provoku kontraŭ si tiun opozicion kaj sanigan kontrolon.

° °
°

## 2 - La iluzioj de la ĝenerala balotado.

...la ĝenerala balotado estas la elmontrado samtempe plej larĝa kaj plej rafinita de la politika ĉarlatanismo ŝtata ; danĝera instrumento, ja, kiu postulas de sia uzanto grandan lertecon, sed kiu estas, se bone uzata, la plej certa rimedo por igi la popolamasojn kunlabori en la starigo de sia propra prizono. Napoleono la IIIa fondis tutan sian potencon sur la ĝenerala balotado, kiu neniam perfidis lian konfidon. Bismarko faris el ĝi la bazon de sia knuta-germana Imperio.

...la vero, hodiaŭ konfesata de la plej stultaj despotoj, estas ke la formoj t.n. konstituciaj aŭ reprezentaj neniel estas obstaklo kontraŭ la despotismo ŝtata, militista, politika kaj financa ; male ili legalizas la despotismon kaj ŝajnigante ĝin popola administrado, ili povas konsiderinde pliigi ĝian forton kaj ĝian internan potencon.

Ĉiuj balotoj de post la Decembra ŝtatrenverso estis rekte faritaj de la Francia popolo ; ĉu ili ne estis antipode kontraŭaj al la interesoj de tiu popolo, kaj ĉu la lasta voĉdonado pri la imperia plebiscito ne liveris sep milionojn da "JES" al la imperiestro ? Oni eble diros, ke la ĝenerala balotado neniam estis libere aplikata sub la imperia regno : la gazetara libereco, tiu de asociado kaj kunvenado, esencaj kondiĉoj de la politika libereco, estis malpermesitaj, kaj la popolo sendefende liverita al la korupta agado de subaĉetita gazetaro kaj de senhonora administracio. Konsentite. Sed la baloto de 1848 por la Konstitucianaro kaj la prezidenteco, tiu de majo 1849 por la leĝofara Asembleo, estis absolute liberaj, mi opinias. Ili okazis ekstere de ĉia premo aŭ eĉ oficiala interveno, kun ĉiuj kondiĉoj de la plej absoluta

libereco. Kaj tamen, kion ili produktis ? Nenion alian, krom la reakcio.

"Unu el la unuaj agoj de la registaro, diris Prudhon, tiu pri kiu ĝi plej sin gratulis, estas la aplikado de la ĝenerala balotado. La saman tagon, kiam la dekreto estis publikigita, ni skribis tiujn vortojn, kiuj tiam povis aspekti paradokso : 'La ĝenerala balotado estas la kontraŭ-revolucio'. Oni povas juĝi laŭ la evento, ĉu ni eraris. La elektoj de 1848 estis je grandega plimulto faritaj de la pastroj, legitimistoj, de la dinasti-partizanoj, de ĉio plej reakcia, kion enhavas Francio, de ĉio plej regresema. Tio ne povis okazi alie."

Ne, tio ne povis esti kaj ankoraŭ nun ne povos esti alie, tiom longe dum la malegaleco de la ekonomiaj kaj sociaj kondiĉoj de la vivo daŭre superfortos en la sociorganizado ; tiom longe dum la socio estos dividita en du klasojn, el kiuj unu ekspluatanta kaj privilegiita ĝuos la avantaĝojn de la riĉeco, de la instruiteco kaj senokupeco, kaj la alia, konsistanta el la tuta proletamaso, ricevos kiel parton nur la tedan kaj truditan manlaboron, la sensciencon, la mizeron kaj ties devigatan akompanon, la sklavecon, ne rajtan sed faktan.

Jes, la sklavecon, ĉar se eĉ vastaj, la politikaj rajtoj konsentitaj al tiuj milionoj da salajrataj proletoj, veraj malsatpunitoj, vi neniam sukcesos ilin savi de la pereiga influo kaj natura superrego de la diversaj reprezentantoj de la privilegiita klaso, ekde la pastro ĝis la burĝa respublikano plej jakobena, plej ruĝa.

Sed, diros oni, la laboristoj fariĝinte laŭsperte pli saĝaj, ne plu elektos burĝojn por la konstituciantaj kaj leĝofaraj asembleoj, ili tie elektos simplajn laboristojn... Ĉu vi scias tion, kio rezultos el tio ĉi ? La laboristoj deputitoj transportitaj en burĝajn vivkondiĉojn, en etoson el politikaj ideoj tute burĝaj, ĉesos esti fakte laboristoj por fariĝi ŝtatistoj, fariĝos burĝoj, kaj eble ili estos eĉ pli burĝaj ol la burĝoj mem. Ĉar la pozicioj ne faras la homoj, sed male la homojn faras la pozicioj. Kaj ni scias laŭsperte, ke la "burĝaj laboristoj" ofte

estas nek malpli egoistaj ol la ekspluatantaj burĝoj, nek malpli pereigaj por la Internacio ol la socialistaj burĝoj, nek malpli vantaj kaj ridindaj ol la nobeligitaj burĝoj.

Ĉu diri, ke ni, revoluciaj socialistoj, ne volas la ĝeneralan balotadon, al kiu ni preferus aŭ limigitan baloton aŭ la de unu sola homo despotismon ? Tute ne. Kion ni asertas, estas tio ke la ĝenerala balotado, konsiderata sole kaj aganta en socio fondita sur la ekonomia kaj socia malegaleco, ĉiam estas por la popolo nur tromplogilo ; ke, flanke de la burĝaj demokratoj, ĝi ĉiam estos nur abomena mensogo, la plej fidinda instrumento por plifirmigi - sub ŝajno de liberalismo kaj justeco, damaĝe al la popolaj interesoj kaj libereco - la ĉiaman superregadon de la ekspluatantaj kaj posedantaj klasoj.

Konsekvence, ni neas, ke la ĝenerala balotado estas eĉ instrumento, kiun la popolo povus uzi por konkeri la justecon aŭ la ekonomian kaj socian egalecon; ĉar, kiel mi ĵus tion demonstris, la ĝenerala balotado praktikata... en la popolaj dependo kaj nesciado ...necese kaj ĉiame produktos voĉdonon kontraŭan al la popolaj interesoj...

Sekve de tio, ni asertas, ke la t.n. socialistaj demokratoj kiuj, en la landoj kie ankoraŭ ne ekzistas ĝenerala balotado, klopodas persvadi la popolon, ke ĝi devas tiun konkeri antaŭ ĉio, - samkiel hodiaŭ faras la partiestroj de la socialista demokratio en Germanio, dirante al ĝi, ke la politika libereco estas la antaŭa kondiĉo de ĝia ekonomia emancipiĝo, - estas aŭ mem viktimoj de pereiga eraro, aŭ trompantoj de la popolo. Ĉu ili reale nescias, aŭ ĉu ili ignoras, ke tiu "antaŭa" politika libereco, - t.e. necese ekzistanta ekstere de la ekonomia kaj socia egaleco, ĉar ĝi devos antaŭi ĉi-lastan, - estos esence burĝa libereco, t.e. fondita sur la popola sklaveco kaj konsekvence nekapabla produkti sian malon kaj krei tiun ekonomian kaj socian egalecon, kiu implicas la detruon de la ekskluziva libereco de la burĝoj ?

Kio por mi estas certa, tio estas, ke ne ekzistas hodiaŭ plej malbonaj malamikoj de l'popolo ol tiuj,

kiuj provas forlogi ĝin for de la socia revolucio, - la sola, kiu povas doni al ĝi kaj la realan liberecon, kaj la justecon, kaj la bonstaton, - por ĝin denove altiri al la iluziaj eksperimentoj pri tiuj reformoj aŭ revolucioj ekskluzive politikaj, kies instrumento, viktimo kaj trompito ĝi ĉiam estis.

La socia revolucio neniel ekskludas la revolucion politikan. Male, ĝi tiun ĉi necese implicas, sed komunikante al ĝi tute novan karakteron : tiun de la reala popola liberiĝo el la ŝtata jugo. Ĉar ĉiuj institucioj kaj ĉiuj politikaj aŭtoritatoj estis kreitaj nur cele al protektado kaj garantiado al la ekonomiaj privilegioj de la posedanta kaj ekspluatanta klaso kontraŭ la ribeloj de l'proletaro, tial estas klare, ke la socia revolucio devos detrui tiujn instituciojn kaj aŭtoritatojn, ne antaŭe nek poste sed SAMTEMPE : ke ĝi metos sian aŭdacan manon sur la ekonomian fundamenton de la popola servuteco...

La politika revolucio samtempa kiel la socia revolucia kaj ne apartigebla de ĝi, kies, se tiel diri, sinesprimo aŭ negativa manifestiĝo ĝi estos, ne plu estos transformado sed grandioza likvidado de la Ŝtato.

° ° °

## 3 - La libereco en la "popola Ŝtato".

En la popola Ŝtato de S-ro Marks, oni diras al ni, ne estos privilegiita klaso. Ĉiuj estos egalaj, ne nur koncerne juron kaj politikon, sed ankaŭ ekonomion. Oni tion almenaŭ promesas, kvankam mi forte dubas, se konsideri la manieron kiel oni agas kaj la vojon alcelatan, ĉu oni iam povos plenumi sian promeson. Do ne plu estos privilegiita klaso, sed registaro, kaj rimarku ĝin bone, registaro ekscese komplika, kiu ne kontentiĝos politike regi kaj administri la popolamasojn, kiel faras ĉiuj nunaj registaroj, sed krome ilin administros ekonomie, en siaj manoj koncentrante la produktadon kaj la "justan" distribuon de la riĉaĵoj.

Mi estas konvinkita partizano de la ekonomia kaj socia egaleco, tial, ke mi scias, ke en foresto de

tiu egaleco, - libereco, justeco, homa digno, moraleco kaj individua bonstato samkiel nacia prospero neniam estos io alia krom mensogoj. Sed ĉar tamen partizano de la libereco, tiu unua kondiĉo de la homeco, mi opinias, ke la egaleco devas establiĝi en la mondo per la spontana organizado de la laboro kaj kolektiva proprieto en produktantaj asocioj libere organizitaj..., sed ne per la plej supera kaj kuratora agado de la Ŝtato.

Jen estas la punkto, kiu apartigas precipe la socialistojn aŭ revoluciajn kolektivistojn disde la aŭtoritataj partizanoj de la absoluta iniciato de la Ŝtato.

...egaleco estas ebla nur kun kaj per la libereco. Egaleco sen libereco, tio estas la ŝtata despotismo, kaj la despota ŝtato ne povus ekzisti eĉ unu solan tagon sen havi almenaŭ unu eksplutatantan kaj privilegiitan klason.

Nia granda kaj vera majstro al ĉiuj, Prudhon, diris en sia bela libro '''"La Justeco en la Revolucio kaj en la Eklezio", ke la plej ruiniga kombino, kiu povus formiĝi, estus tiu, kiu kunigus socialismon kun absolutismo, la popolajn tendencojn kun ekonomia emancipado kaj materiala bonstato kun la diktaturo kaj koncentrado de ĉiuj politikaj kaj sociaj povoj en la Ŝtato.

La estonteco gardu nin kontraŭ la favoroj de la despotismo ; sed ĝi savu nin de la katastrofaj kaj brutigaj konsekvencoj de la socialismo aŭtoritata, doktrina aŭ ŝtata.

''''''

...ni ne nur ne intencas nek plej ete deziras trudi al nia popolo aŭ al iu ajn alia popolo tian aŭ tian idealon pri socia organizado, trovitan en la libroj aŭ de ni mem elpensitan, sed eĉ ni serĉas tiun idealon en la sino mem de l'popolo, konvinkitaj, ke la popolamasoj portas en si, en siaj instinktoj pli-malpli disvolvitaj de la historio, en siaj ĉiutagaj necesoj kaj en siaj konsciaj aŭ nekonsciaj aspiroj, ĉiujn elementojn de normala organizado de la estonteco.

...Kiu prenas sian deir-punkton en la abstrakta pen-

so, tiu neniam povos alceli la vivon, ĉar ne ekzistas vojo povanta konduki de la metafiziko ĝis la vivo. Ilin disigas abismo. Transpasi tiun abismon, realigi mortigan salton - aŭ kion Hegel nomas "kvalita salto" - de la mondo de l'logiko al la mondo de l'naturo, de la reala vivo, neniu ĝis nun tion sukcesis, kaj neniu iam sukcesos. Kiu sin apogas sur la abstrakto, tiu en ĝi mortos.

La vojo vivanta, konkrete rezonita, - tio ĉi estas la scienco ; ĝi estas la vojo kondukanta de la reala fakto ĝis la penso, kiu ĉi-lastan ampleksas, esprimas kaj konsekvence eksplikas ; kaj en la praktika mondo - la vojo estas la movo de la socia vivo al organizado plej eble penetrita de tiu ĉi vivo, konforme al la indikoj, al la kondiĉoj, al la necesoj kaj postuloj pli-malpli pasiaj de tiu vivo mem.

La revoluciaj socialistoj opinias, ke kuŝas pli da praktika racio kaj spirito en la instinktaj aspiroj kaj en la realaj bezonoj de la popolamasoj ol en la profunda inteligento de ĉiuj doktoroj kaj kuratoroj de la homaro kiuj, al tiom da fuŝitaj provoj por ĉi-lastan feliĉigi, ankoraŭ pretendas aldoni klopodojn siajn.

''''''

Per nia polemiko kontraŭ la marksanoj ni alkondukis ilin konfesi, ke la libereco aŭ anarkio, t.e. la libera organiziĝo de la laboristaj homamasoj de malsupre supren estas la fina celo de la socia disvolviĝo, kaj ke ĉia ŝtato sen escepti ilian popolan Ŝtaton estas jugo, kiu naskas unuflanke la despotismon kaj aliflanke la sklavecon.

Ili diras, ke tiu ŝtata diktaturo-jugo estas transira neevitebla rimedo por atingi la plenan emancipiĝon de la popolo : anarkio aŭ libereco - jen la celo ; ŝtato aŭ diktaturo - jen la rimedo. Do, por emancipila laboristaron, estas necese unue ĝin kateni.

Ĝis nun nia polemiko ne preterpasis tiun kontraŭdiron. Ili asertas, ke sole la diktaturo - la ilia, evidente - povas krei la popolan volon ; ni respondas : nenia diktaturo povas havi alian celon ol

daŭradi, nenia diktaturo povus naskigi kaj disvolvi en la popolo, kiu ĝin elportas, ion alian kromsklaveco ; la libereco povas esti kreita nur per la libereco.

° °
°

4 - Revolucia moralo.

...sen zorgi pri la praktikaj konsekvencoj, ni volas antaŭ ĉio la veron kaj nur la veron. Krome, ni havas tiun fidon, ke, malgraŭ ĉiuj kontraŭaj ŝajnoj, malgraŭ ĉiuj timemaj sugestoj de politika kaj skeptika singardeco, sole la vero povas krei la praktikan bonon de la homoj.

Tiela estas nia unua kredartikolo ; kaj ni ja devigos vin konfesi, ke ankaŭ ni havas iun fidon... Ĝi nur neniam rigardas malantaŭen, sed ĉiam antaŭen.

""""""

Kaj mi, revolucia socialisto, ĝisosta malamiko de ĉiuj aristokratioj, de ĉiuj kuratorecoj, de ĉiuj kuratoroj, mi opinias, ke endas ĉion diri al la popolo, ĉar tio estas la sola rimedo estigi ties rapidan kaj plenan emancipiĝon.

""""""

...nur el la sola vero oni povas ĉerpi fortojn por kontraŭbatali la malbonon, pro kiu oni suferas.

""""""

...la duonvero estas same nelogika teorie, kiel pereiga praktike.

""""""

Ĉu vi volas kompreni, finfine, ke sur la jezuita mensogo oni povas konstrui nenion solidan, nek vivpersistan ; ke ne sur la trivialaj kaj malnoblaj pasioj devas sin apogi la revolucia agado ?

° °
°

### 5 - Ĉu detrui ?

Neniu povas voli detrui sen havi almenaŭ foran imagon veran aŭ falsan pri la aferordo, kiu devus sekvi la nuntempan ; kaj ju pli tiu imago estas en li vivanta, des pli lia detruiva forto fariĝas potenca ; kaj ju pli ĝi proksimiĝas al la vero, t.e. ju pli ĝi estas konforma al la necesa disvolviĝo de la nuna socia mondo, des pli la efikoj de lia detruiva agado fariĝas bonfaraj kaj utilaj. Ĉar la detruiva agado ĉiam estas determinita, - ne nur en sia esenco kaj en la grado de sia intenso sed ankaŭ en siaj modaloj, en siaj vojoj kaj uzataj rimedoj, - de la pozitiva idealo, kiu konsistigas ĝian unuan inspiron, ĝian animon.

### 6 - Ni ne leĝodonu.

Ni ne estu doktrinemaj, ni ne antaŭe aranĝu konstituciojn pozante kiel leĝodonantoj de la popolo. Ni memoru, ke nia misio estas tute alia : ni ne estas la guvernistoj, sed nur la pioniroj de la popolo; nia devo estas trabati al ĝi vojon ; ni memoru, ke nia destino ne estas tiom teoria kiom praktika.

Estas neeble determini formon konkretan, universalan kaj devigan por la interna disvolvado kaj por la politika organizado de la nacioj ; ĉar la ekzisto de ĉi-lastaj dependas de amaso da malsamaj kondiĉoj historiaj, geografiaj, ekonomiaj, kiuj neniam ebligos starigi modelon de organizado bona kaj akceptebla por ĉiuj. Tia entrepreno absolute seneca je praktika utileco cetere malutilus al la riĉeco kaj spontaneco de la vivo, kiu plej floras en la senlima diverseco, kaj krome ĝi estus kontraŭa al la principo mem de libereco. Tamen estas esencaj, absolutaj kondiĉoj en kies foresto la praktika realigado kaj la organizado de la libereco neeblaj ĉiam estos.

## 7 - Abolicio de la Ŝtato. Abolicio de la heredrajto.

Abolicio, diseriĝo kaj bankroto morala, politika, jura, burokrata kaj financa de la Ŝtato kuratora, transcenda, centraliza...

...abolicio de la Ŝtata juĝistaro ; ĉiuj juĝistoj devos esti elektitaj de la popolo ; abolicio de la kodoj kriminalaj kaj civilaj, kiuj nuntempe validas en Eŭropo, tial, ke ĉiuj - egale inspiritaj de la kulto al Dio, al la Ŝtato, al la religie aŭ politike konsekrita familio, al la proprieto - estas kontraŭaj al la homrajto, kaj tial, ke la kodo de la libereco povus esti kreita nur per la sola libereco.

"""

La abolicio de la Ŝtato ne povus esti realigita per unu fojo ; ĉar en la historio samkiel en la fizika naturo, nenio estas elfarita per unu fojo. Eĉ la plej subitaj revolucioj, la plej neatenditaj kaj la plej radikalaj ĉiam estis preparitaj per longa laboro de dispartigado kaj nova formado, laboro subtera aŭ videbla sed neniam interrompita kaj ĉiam kreskanta. Do, ankaŭ por la Internacio ne temas pri detruo inter hodiaŭ kaj morgaŭ de ĉiuj ŝtatoj. Tion entrepreni aŭ nur revi estus frenezaĵo.

Ĉu endas montri kiel la "heredrajto" generas ĉiujn ekonomiajn, politikajn kaj sociajn privilegiojn ? Evidentas, ke nur per ĝi konserviĝas la klasdiferenco ! Pro la heredrajto eterniĝas la naturaj diferencoj samkiel la portempaj diferencoj koncerne riĉecon aŭ feliĉon, kiuj povas ekzisti inter la individuoj kaj devus malaperi laŭmezure kiel la individuoj mem malaperas ; ili - se tiel diri - ŝtoniĝas kaj, fariĝante tradiciaj diferencoj, kreas denaskajn privilegiitojn, fondas la klasojn kaj fariĝas kreskanta fonto de ekspluatado super milionoj da laboristoj fare de miloj da "favore naskitaj" homoj.

Tiom longe dum funkcios la heredrajto, ne povos esti en la mondo egaleco ekonomia, socia kaj politika ; kaj tiom longe dum ekzistos neegaleco, regos subpremado kaj ekspluatado.

Kion ni volas kaj devas aboli, tio estas la heredrajto fondita sur la jurisprudenco kaj konsistiganta la bazon mem de la jura familio kaj de la Ŝtato.

Egale kompreniĝas, ke ni ne intencas aboli la sentimentalan heredon. Sub tiu nomo ni celas la heredon konsistantan el nemultvaloraj al la forpasintoj apartenintaj objektoj, kiuj, se tiel diri, konservis pro longa uzado ties personan stampon, kaj kiujn transprenas ties amikoj kaj parencoj. La serioza heredo estas tiu, kiu certigas al la heredantoj, ĉu plene ĉu nur parte, la eblecon senlabore vivi elprenante el la kolektiva laboro aŭ la renton de la grundo aŭ la interezon de la kapitalo. Ni postulas, ke la kapitalo samkiel la grundo, unuvorte ĉiuj instrumentoj kaj ĉiuj krudmaterialoj, ĉesante esti transdoneblaj per la heredrajto, fariĝu porĉiama posedaĵo kolektiva de ĉiuj produktivaj asocioj.

Estas malmulte da laboristoj, kiuj ne komprenas, ke abolicio de la heredrajto estontece estos la plej supera kondiĉo de egaleco. Sed estas kelkaj, kiuj timas, ke nuna abolicio de la heredrajto - antaŭ ol nova socia organizado certigos la sorton de ĉiuj infanon senescepte - lasos iliajn gefilojn en mizerego post morto de la gepatroj.

"Ĉu eble ?! ili diras, mi amasigis per ŝvitiga laboro kaj kruelaj seniĝoj ducent, tricent aŭ kvarcent frankojn, kaj miaj gefiloj estos je tio senigitaj !" Jes, ili estos senigitaj je tio, sed kompense ili ricevos de la socio, sen ia damaĝo kontraŭ la naturaj rajtoj de la gepatroj, vivtenadon, edukon kaj instruon, kiujn vi ne kapablus certigi al ili per tridek aŭ kvardek mil frankoj. Ĉar evidentas, ke tuj kiam la heredrajto estos aboliciita, la socio devos sin ŝarĝi per ĉiuj elspezoj necesaj al la fizika, morala kaj intelekta disvolvado de ĉiuj geknaboj, kiuj naskiĝos en ĝia sino...

Pluraj pretendas, ke, aboliciante la heredrajton, oni detruos la plej grandan stimulilon, kiu puŝas la homojn al la laboro. Kiuj tiel pensas, tiuj plukonsideras la laboron kiel necesan malbonon aŭ, por teologie paroli, kiel la efikon de la malbeno, kiun Jehovo en sia kolero ĵetis sur la malfeliĉan homspecion, kaj

kiu pro stranga kaprico lia, ampleksis lian tutan kreitaron.

Sen partopreni en tiu grava diskuto teologia, bazîĝante sur la simpla studo de la homa naturo, ni respondos al la mallaŭdantoj de la laboro, ke ĉi-lasta, anstataŭ esti malbono aŭ malmilda neceso, por ĉia plenkapabla homo estas bezono. Por certiĝi pri tio, ĉiu povas fari pri si mem eksperimenton : li sin kondamnu nur por kelkaj tagoj al absoluta senfareco, aŭ al laboro sterila, neproduktiva, stulteca, kaj li fine konstatos, ke li sentas sin la plej malfeliĉa kaj la plej senvalora el la homoj. La homo pro sia naturo mem estas devigata labori, samkiel li estas devigata manĝi, trinki, pensi, paroli.

La laboro estas hodiaŭ malbenita pro tio, ke ĝi estas ekscesa, brutiga, deviga, pro tio ke ĝi neniigas la libertempon kaj senigas la homojn je la ebleco home ĝui la vivon ; pro tio, ke ĉiu aŭ preskaŭ ĉiu estas devigata apliki sian produktivan forton al la speco de laboro, kiu malpli respondas al liaj naturaj inklinoj...

La tagon, kiam la laboro muskola kaj nerva, samtempe mana kaj intelekta, estos konsiderata kiel la plej granda honoro de la homoj, kiel la signo de ilia vireco kaj homeco, la socio estos savita ; sed tiu tago ne venos, tiom longe dum pluestos la regno de neegaleco, tiom longe dum ne estos aboliciita la heredrajto.

""""

Unuj sin lokas en plena estonteco kaj, prenante kiel deirpunkton la kolektivan proprieton, opinias, ke ne necesas paroli pri la heredrajto ; kontraŭe deiras ni de la nuntempo, ni troviĝas sub la reĝimo de la triumfa individua proprieto kaj marŝante al la kolektiva proprieto, ni renkontas obstaklon : la heredrajton ; ni do opinias, ke ĝi estas renversenda, abolicienda.

° ° °

## 8 - Familio laŭleĝa kaj familio laŭnatura.

Egaligon de la virinaj rajtoj - rajtoj politikaj samkiel rajtoj soci-ekonomiaj - kun tiuj de la viro.

Abolicion ne de la familio natura, sed la familio laŭleĝa fondita sur la civila rajto kaj sur la proprieto. La religia kaj civila geedzeco estas anstataŭita per la libera geedzeco. Du individuoj plenaĝaj kaj sekse malsamaj rajtas unuiĝi kaj disiĝi laŭ sia volo, siaj reciprokaj interesoj kaj la bezonoj de sia koro sen tio, ke la socio rajtu ĉu malhelpi ilian unuiĝon ĉu tiun pluteni kontraŭ ilia volo... Unuiĝo de la du seksoj devas esti plene libera, kio estas ĉie kaj ĉiam la kondiĉo "sine qua non" de la sincera moraleco. - Nek la forto de la pasio, nek la rajtoj libere konsentitaj en la pasinteco povos utili kiel senkulpigo pri iu ajn atenco fare de unu kontraŭ la libereco de la alia - kaj ĉiu atenco tia estos konsiderata kiel krimo.

... ni estas konvinkitaj, ke, aboliciante la geedzecon religian, la geedzecon civilan kaj juran, ni redonas la vivon, la realecon, la moralecon al la geedzeco natura fondita nure sur la respekto al la homo kaj sur la libereco de du personoj, viro kaj virino, kiuj sin amas reciproke ; ...ĝenerale forpuŝante ĉian intervenon de iu ajn aŭtoritato en ilia unuiĝo, ni igas ilin pli sendisige unuigitaj, multe pli fidelaj kaj lojalaj unu por la alia.

""""

La infanoj estas nenies posedaĵo : ili estas la posedaĵo nek de siaj gepatroj nek de la socio. Ili apartenas nur al sia estonta libereco. Sed ĉe la infanoj tiu libereco estas ankoraŭ nereala, ĝi estas nur virtuala. Ĉar la reala libereco, - t.e. la realiĝo de plena konscio bazita sur propra dignosento kaj sur la respekto al alies libereco kaj digno, unuvorte sur la justeco - tia libereco povas disvolviĝi ĉe la infanoj nur per racia disvolviĝo de ilia memo, de ilia karaktero kaj de ilia volo.

El tio sekvas, ke la socio, kies tuta estonteco dependas de la edukiteco kaj instruiteco de la infanoj, kiu konsekvence ne nur rajtas sed ankaŭ devas ilin prizorgi, estas la sola gardanto de la infanoj.

...la vivtenado, la edukado kaj instruado de la infanoj devas esti egalaj por ĉiuj, kaj je la kostopago de la socio.

La gepatroj rajtos havi siajn gefilojn en kunvivado sub la kuratoreco kaj plej supera kontrolo de la socio, kiu ĉiam konservos la rajton kaj la devon apartigi la gefilojn disde la gepatroj ĉiufoje, kiam ĉi tiuj ĉu per sia ekzemplo ĉu per siaj instruoj aŭ brutala, nehumana traktado povos ilin demoralizi aŭ eĉ malhelpi ilian malvolviĝon.

''''''

La maljunuloj, la invalidoj, la malsanuloj estos ĉirkaŭitaj de zorgoj kaj respekto, ĝuos ĉiujn rajtojn tiel politikajn kiel sociajn kaj estos bone traktataj, kaj senŝpare vivtenataj kostopage de la socio.

° ° °

## 9 - Libereco de la kultoj.

Absolutan konscienc- kaj propagand-liberecon por ĉiu, kun nelimigita povo starigi tiom da temploj kiom plaĉos al ĉiu, kaj liberecon pagi, vivteni la pastrojn de sia religio.

La eklezioj povos nek heredi nek komune posedi bienojn, escepte de siaj domoj aŭ preĝejoj, kaj neniam povos okupiĝi pri la infanedukado.

° ° °

## 10 - Individuaj rajtoj.

La libereco de ĉiu plenaĝa individuo - viro kaj virino - devas esti absoluta kaj kompleta. Libereco iri kaj reiri, publike deklari ĉiuspecajn opiniojn, esti pigra aŭ aktiva, malmorala aŭ morala, unuvorte disponi sian propran personon kaj havaĵon laŭplaĉe, sen pri tio raporti al iu ajn ; libereco vivteni sin

ĉu honeste per la propra laboro, ĉu hontinde ekspluatante la privatan almozdonon aŭ konfidon, kondiĉe ke tiu almozdono kaj konfido estu memvolaj kaj prodigataj de plenaĝaj individuoj.

Nelimigitan liberecon de ĉiaspeca propagando per la parolo, per la gazetaro, en la publikaj kaj privataj kunvenoj, sen alia bremso ol la saniga potenco natura de la publika opinio. Absolutan liberecon de asociado sen escepti tiujn, kiuj pro sia celo estos aŭ ŝajnos malmoralaj kaj eĉ tiujn, kiuj havos kiel celon la koruptadon kaj la (...)° de la libereco individua kaj publika.

La libereco povas kaj devas esti defendata nur per la libereco ; kaj danĝera kontraŭsenco estas la volo ĝin atenci, je verŝajniga preteksto ĝin protekti ; kaj ĉar la moralo ne havas alian fonton, alian stimulilon, alian kaŭzon, alian objekton krom la libereco, ĉar ĝi mem estas nenio alia, krom libereco, ĉiuj restriktoj al ĉi-lasta truditaj kun la celo protekti la moralon, ĉiam efikis domaĝe al tiu ĉi. La psikologio, statistiko kaj tuta historio pruvas al ni, ke la individua kaj socia senmoraleco ĉiam estis la necesa konsekvenco de malbona edukado publika kaj privata, de foresto kaj difektiĝo de la publika opinio - kiu ekzistas, disvolviĝas kaj sin moraligas sole nur per la libereco - kaj precipe la konsekvenco de netaŭga sociorganizado. La sperto instruas al ni, diras la fama franca statistikisto Quetelet, ke kiu ĉiam preparas la krimojn, estas ja la socio, kaj ke la malbonfaristoj estas nur la fatalaj instrumentoj por ilin plenumi. Estas do senutile kontraŭmeti antaŭ la socia senmoraleco la rigorecon de leĝaro, kiu transpasus la limon de la individua libereco... ni devas doni al la socio la publikan opinion kiel gardiston kaj animon, kaj la plej absolutan liberecon.

Tamen la socio ne devas resti tute senarma kontraŭ la individuoj pigraj °°, malbonfaraj kaj malutilaj. Ĉar la laboro devas esti la bazo de ĉiuj

-------

°)vorto nelegebla en la manuskripto.
°°) vorto necerta.

politikaj rajtoj, ĉi tiujn la socio povos rifuzi, en siaj komunumoj, provincoj kaj nacioj, al ĉiuj plenaĝaj individuoj nek invalidaj nek malsanaj nek maljunaj, kiuj vivtenos sin per la publika aŭ privata almozdono ; sed ĝi estos devigata tiujn rajtojn restitui al ili, tuj kiam ili ekakiros per propra laboro vivrimedojn.

Ĉar la libereco de ĉiu homa individuo estas nefordonebla, la socio neniam toleros, ke iu ajn individuo jure fordonu sian liberecon, aŭ kontrakte ĝin ligu rilate alian individuon, se tio ne fariĝas en plena egaleco kaj reciprokeco - Ĝi tamen ne povos malhelpi, ke viro aŭ virino senigita je ĉia sento de persona digno, sen kontrakto, memvole servute rilatu al alia individuo ; sed ĝi konsideros ilin individuoj vivantaj per privata almozdono kaj konsekvence senigitaj je politikaj rajtoj dum la tuta daŭro de tiu servuteco.

Ĉiuj personoj perdintaj siajn politikajn rajtojn estos ankaŭ senigitaj je la rajto eduki kaj gardi siajn infanojn. En okazo de nefideleco al libere konsentita sindevontigo, aŭ en okazo de malkaŝa aŭ pruvita atako kontraŭ la posedaĵo, persono kaj precipe kontraŭ la libereco de civitano ĉu landana ĉu alilanda, la socio aplikos al la deliktulo landana aŭ alilanda la punojn determinitajn per siaj leĝoj.

Nepran abolicion de ĉiuj malnobligaj kaj kruelaj punoj, de la korpaj punoj, kaj de la mortpuno kiel puno konsekrita kaj efektivigita per la leĝo. Abolicion de ĉiuj punoj tro longaj aŭ kun nedifinita fino, kiuj lasas neniun esperon kaj neniun realan eblecon de rehonorigo, ĉar la krimo devas esti konsiderata kiel malsano, kaj la puno pliĝuste kiel kuracado ol kiel depostulo de la socio.

Ĉiu individuo kondamnita per la leĝoj de ajna socio, komunumo, provinco aŭ nacio, konservos la rajton ne submetiĝi al la puno al li trudita, deklarante, ke li ne plu volas esti ano de tiu socio. Sed tiaokaze la socio siavice rajtos lin elpeli el sia sino kaj lin deklari ekster sia garantio kaj protekto. Tiel refalinte sub la naturan leĝon "okulon pro

okulo, denton pro dento", almenaŭ sur la tereno okupita de tiu socio, la rezistanto povos esti prirabita, mistraktita, eĉ mortigita, sen ke tion prizorgu la socio. Ĉiu povos lin apartigi kiel malbonfaran beston, tamen neniam lin servutigi aŭ uzi kiel sklavon.

° ° °

11 - Rajtoj de la asocioj.

Kia ajn estas ilia objekto, ĉiuj asocioj samkiel ĉiuj individuoj devas ĝui absolutan liberecon. Nek la socio nek ia parto de ĝi - komunumo, provinco aŭ nacio - rajtas malhelpi liberajn individuojn libere asociiĝi por iu ajn celo : religia, politika, scienca, industria, arta aŭ eĉ kun celo korupti la socion aŭ ekspluati nesciantojn kaj stultulojn, kondiĉe ke ĉi tiuj ne estu neplenaĝuloj. Kontraŭbatali la ĉarlatanojn kaj la nocajn asociojn, tio estas nurnure afero de la publika opinio. Sed la socio havas la devon kaj la rajton rifuzi la socian garantion, la juran agnoskon, la politikajn kaj civilajn rajtojn al ĉia asocio, kiu, kiel kolektivo, per siaj objekto, regularo kaj statuto estus kontraŭa al la fundamentaj principoj de la socia Konstitucio, kaj kies ĉiuj membroj ne estus en rilato de perfekta egaleco kaj reciprokeco ; tamen la socio ne povus senigi je iliaj rajtoj la membrojn mem nur pro la fakto, ke ili partoprenas en asocioj ne sankciitaj per la socia garantio. La diferenco inter la asocioj regulaj kaj neregulaj estos jena : la asocioj jure agnoskitaj kiel kolektivoj havos, kiel tiaj, la rajton persekuti antaŭ la kolektiva justico ĉiujn asociojn, kiuj estos ne plenumintaj sian ŝuldon al ili. La asocioj jure ne agnoskitaj ne havos tiun rajton kiel kolektivoj ; tial ili povos esti submetitaj al neniu jura respondeco, ĉiuj iliaj sindevontigoj devos esti nulaj antaŭ la okuloj de socio ne sankciinta ilian kolektivan ekziston ; tio ĉi tamen povos liberigi neniun el iliaj membroj de ties individuaj sindevontigoj.

° ° °

## 12 - Organizado de la komunumoj, provincoj kaj nacioj. La komunumo mezepoka kaj la komunumo moderna.

La dividado de landoj en regionojn, provincojn, distriktojn kaj komunumojn nature dependas de la dispozicio de la historiaj kutimoj, de la aktualaj necesoj kaj de la aparta naturo ĉiulanda. Tiucele, povas esti nur du principoj komunaj kaj devigaj por ĉiu lando, kiu volos serioze organizi la liberecon. La unua : ĉia organizado fariĝu de malsupre supren, de la komunumo al la centra unuo landa, al la ŝtato, pere de federo. La dua : inter la Komunumo kaj la ŝtato estu almenaŭ unu aŭtonoma peranto : departemento, regiono aŭ provinco...

La bazo de ĉia politika organizado de lando estu la Komunumo absolute aŭtonoma ĉiam reprezentita de la plejmultaj voĉdonoj de ĉiuj plenaĝaj loĝantoj - viroj kaj virinoj egale. Nenia regpovo rajtas enmiksiĝi en ĝian vivon, en ĝiajn agojn, en ĝian internan administradon. Ĝi balote nomumas kaj eksigas ĉiujn oficistojn, administrantojn kaj juĝistojn ; ĝi sen kontrolo administras la komunumajn bienojn kaj la financojn. Ĉiu komunumo nekontesteble rajtos, sendepende de ĉia supera sankcio, krei sian propran leĝaron kaj sian propran konstitucion. - Sed por aniĝi al la provinca federo kaj por integriĝi en la provincon, ĝi nepre devos konformigi al la fundamentaj principoj de la provinca Konstitucio sian apartan ĉarton. Kaj ĉi tiun sankciigi de la parlamento de tiu provinco. Ĝi devos ankaŭ submetiĝi al la juĝoj de la provinca tribunalo kaj al la dispozicioj kiuj, sankciite per voĉdonado de la provinca parlamento, estos al ĝi ordonitaj de la provinca registaro. Se alie, ĝi estos forigita el la solidareco, garantio kaj komuneco de la provinca leĝo.

La provinco devas esti nur libera federo de aŭtonomaj Komunumoj. La provinca parlamento konsistos aŭ el unu sola ĉambro el reprezentantoj de ĉiuj komunumoj, aŭ el du ĉambroj, unu el reprezentantoj de la komunumoj, la alia el la reprezentantoj de la

tuta provinca loĝantaro, sendepende de la komunumoj.
- La provinca parlamento, neniel enmiksiĝante en la internan administradon (x) de la komunumoj, starigos la fundamentajn principojn, kiuj konsistigos la provincan ĉarton kaj estos devigaj por ĉiuj komunumoj, kiuj volos partopreni en la provinca parlamento. Jen estas la principoj de tiu katekismo (°). Prenante tiujn principojn kiel bazon, la parlamento starigos kodon por la provinca leĝaro same rilate la respektivajn devojn kaj rajtojn de la individuoj, asocioj kaj komunumoj, kiel rilate la punojn al ĉiu trudendajn okaze de malobeo al la de ĝi establitaj leĝoj ;
- ĝi tamen lasos al la komunumaj leĝaroj la rajton diferenci de la provinca leĝaro per akcesoraj punktoj sed neniam per la bazo ; ĝi strebos al reala, vivanta unueco, ne al unuformeco, fidante, por formi ankoraŭ pli intiman unuecon, al la sperteco, al la tempo, al la disvolviĝo de la komuna vivo, al la propraj konvinkoj kaj necesoj de la komunumoj, unuvorte al la libereco, neniam al la premado nek al la perforto de la provinca povo, ĉar eĉ vero kaj justeco, se perforte truditaj, fariĝas maljusteco kaj mensogo. La provinca parlamento ellaboros la konstituan ĉarton de la federacio el komunumoj, ties respektivajn rajtojn kaj devojn, ankaŭ ties devojn kaj rajtojn rilate la provincajn parlamenton kaj tribunalon. Ĝi voĉdonos pri ĉiuj leĝoj kaj dispozicioj neprigitaj ĉu de la bezonoj de la tuta provinco, ĉu de la rezolucioj de la nacia parlamento, neniam forgesante la aŭtonomion provincan kaj komunuman. Neniam enmiksiĝante en la internan administradon de la komunumoj, ĝi precizigos ĉies parton en la provincaj impostoj. Tiu parto estos dispartigita de la Komunumo mem inter ĉiuj laborkapablaj kaj plenaĝaj loĝantoj. - Ĝi fine kontrolos ĉiujn agojn, sankcios aŭ forĵetos ĉiujn proponojn de la provinca registaro, kiu evidente ĉiam estos laŭelekta(y). La provinca tribunalo ankaŭ laŭelekta, juĝos senapelacie ĉiujn aferojn inter individuoj kaj komunumoj, inter asocioj kaj komunumoj, inter komunumoj kaj komunumoj, kaj ĉe la unua instanco ĉiujn aferojn inter

-------

(x)(y) Vd. p.52. - (°)La manuskripto, el kiu tio ĉi estas eltirita, havas kiel titolon "Katekismo revolucia". Ne konfuzi kun la "Katekismo de la revoluciulo" trovita sur Neĉajev. François Munoz

la komunumo kaj la registaro aŭ la provinca parlamento (z).

La Nacio devas esti nenio alia krom federacio el aŭtonomaj provincoj. La Nacia Parlamento...(sekvas teksto paralela al la antaŭa kun jenaj aldonoj ĉe la lokoj signitaj x, y, z :)

x : kaj en la politika vivo.
y : kaj portempa. Formos la naciajn aliancojn, decidos pacon kaj militon, kaj sola rajtos ordoni, ĉiam por determinita tempo, la formadon de nacia armeo. - La registaro estos nur la efektiviganto de ĝiaj voloj. -
z : En la aferoj inter la provincoj de la Ŝtato, kiuj ankaŭ estos submetitaj al ĝia juĝado, la provincoj povos apelacii al la internacia tribunalo, se ĝi troviĝas iam starigita. (Fino de la aldonoj).

Federacio internacia de la revoluciaj popoloj, ĝermo de la federacio universala de l'popoloj.

La federacio internacia de la revoluciaj popoloj estos nature bazita sur la principoj mem de la revolucio. Aplikitaj al la internacia politiko tiuj principoj estas :

Ĉiu lando, ĉiu nacio, ĉiu popolo eta aŭ granda, febla aŭ forta, ĉiu regiono, ĉiu provinco, ĉiu komunumo havas la absolutan rajton disponi pri sia sorto ; determini sian propran ekzistadon, elekti siajn aliancojn, unuiĝi kaj disiĝi laŭ siaj propraj voloj kaj bezonoj neniel konsiderante la t.n. historiajn rajtojn nek la necesojn politikajn, komercajn aŭ strategiajn de la ŝtatoj. - La unuiĝo de la partoj en tuton, por esti vera, fekunda kaj forta, devas esti absolute libera. Ĝi devas rezulti sole nur de la internaj lokaj necesoj kaj de la reciproka altiro de la partoj - altiro kaj necesoj, kies juĝantoj estas nure la partoj.

Neniu el la federitaj landoj povos konservi permanentan armeon nek institucion, kiu disigus la soldaton disde la civitano. - kaŭzoj de internaj ruiniĝo, korupto, brutiĝo kaj tiranio, la permanentaj armeoj estas ankaŭ minaco kontraŭ la prospero kaj sendependo de ĉiuj aliaj landoj. Ĉiu laborkapabla civitano devas se bezone soldatiĝi por defendi sian hejmon aŭ la li-

berecon. La nacia armado devas esti organizita en ĉiu lando komunumope kaj provincope.

Ĉar ĉiuj naciaj liberoj estas solidaraj, tiaj ankaŭ devas esti la apartaj revolucioj de ĉiuj landoj; de nun en Eŭropo, kiel en la tuta civilizita mondo, ne plu estos revolucioj, sed nur la universala revolucio ; same plu estos nur unu sola reakcio eŭropa kaj tutmonda.

"""""

Mazzini pelis sian malamon kontraŭ la Komuno ĝis malsaĝeco. Li pretendas, ke la sistemo proklamita de la lasta revolucio en Parizo nin retroirigus al la mezepoko, nome al la divido de la tuta civilizita mondo en multegon da etaj centroj fremdaj unuj al la aliaj, ignorantaj unuj la aliajn. Li ne komprenas, la povrulo, ke inter la mezepoka Komunumo kaj la moderna Komunumo kuŝas la tuta diferenco estigita ne nur en la libroj, sed en la moroj, en la aspiroj, en la interesoj kaj bezonoj de la landanaroj : kvincent-jara historio. La Komunumoj en Italio estis en sia origino reale izolitaj, centroj de tiom da politikaj kaj sociaj ekzistoj plene sendependaj, ne solidaraj, kiuj devis esti nepre memsufiĉaj.

Kia diferenco hodiaŭ ! La interesoj materialaj, intelektaj, moralaj kreis inter la membroj de unu sama nacio - kion mi diras ? - eĉ inter la malsamaj nacioj mem, iun socian unuecon tiel potencan kaj realan, ke ĉio hodiaŭ farita de la Ŝtatoj por ĝin paralizi kaj detrui restas senpova. Unueco rezistas al ĉio kaj postvivos la Ŝtatojn.

Kiam la Ŝtatoj estos malaperintaj, la vivanta, fekunda, bonfara unueco same de la regionoj kiel de la nacioj, kaj de la internacieco de la tuta civilizita mondo unue, poste de ĉiuj popoloj sur la Tero, per la libera federo kaj la organizado de malsupre supren, - la unueco disvolviĝos en sia tuta majesteco.

"""""

La mezepoko... proklamis la dogmon de Unueco, kaj neniam la homa mondo estis pli dividita kaj pli ŝirvundita, neniam, ne nur la nacioj sed ankaŭ la konsistaj partoj de sama lando kaj sama provinco, tiom

sin reciproke ignoris, kiom en tiu egoisma epoko aŭ, se vi volas, en tiu epoko de individuaj kaj lokaj aŭtonomioj. Hodiaŭ, kiam la katolika kaj simbola unueco ne plu ekzistas ; hodiaŭ, kiam superiĝas libereco de la penso kaj anarkio de la konsciencoj, spite al Mazzini la unueco de la homa mondo male fariĝas ĉiutage pli reala : neniu evento iom grava povas okazi en eŭropa lando sen tio, ke ĝi tuj reefikas kaj sentigas sian influon ne nur en ĉiuj aliaj landoj de la civilizita mondo, sed ĝis Ĉinio kaj Japanio.

''''''

Mazzini ĉiam estis la obstinega kontraŭulo de aŭtonomio de la provincoj, kiu kompreneble ĝenus la severan unuformecon de lia granda Ŝtato itala. Li pretendas ke, por kompensi la ĉiopovecon de la forte konstituita respubliko, sufiĉos aŭtonomio de la komunumoj. Li eraras : neniu izolita komunumo estus kapabla rezisti al la potenco de tiu terura centralizado ; de tio ĝi estus dispremita. Por ne venkite fali en tiu lukto, ĝi do devus federiĝi cele al komuna rezistado kun ĉiuj najbaraj komunumoj por formi kun ili aŭtonoman provincon. Krome, de kiam la provincoj ne estos aŭtonomaj, ili estos regendaj pere de ŝtataj funkciuloj. Inter la rigore konsekvenca federismo kaj la burokrata reĝimo ne estas meza stato.

° ° °

# III

# BURĜARO KAJ SABRA REĜIMO

...la burĝo, kvankam fariĝinte pro intereso tre servisteca, tamen restis temperamente kaj malbonkutime tre opoziciema. Li agnoskas la neceson de forta povo kapabla protekti liajn ekonomiajn privilegiojn kontraŭ la ribeloj de la triviala homomulto. Li kliniĝas antaŭ la militista diktaturo, danka, ve! ĉar ĝi sola estas hodiaŭ sufiĉe potenca por lin defendi. Sed samtempe li ĝin abomenas en la fundo de l'koro tial, ke ĝi ŝokas lin en lia liberalismo, en lia vanteco, kaj tial ke ĝi fine ĉiam kompromitas liajn interesojn mem, en kies nomo kaj por kies defendo ĝi ekzistas.

La idealo de la burĝoj nevarie restas ĉiam kaj ĉie la sama... ĝi estas, se nomi la aferojn per ties nomo, la politika libereco reala por la posedantaj klasoj, fiktiva por la popolamasoj, kaj fondita sur la ekonomia sklaveco de ĉi-lastaj. Ĝi estas bonega sistemo kaj tutprofita al la burĝa klaso, kiel oni vidas, sed kiu povas sin teni nur en la landoj, kie la laboristamaso estas sufiĉe saĝa kaj rezignaciinta, aŭ sufiĉe grandanima por senti sin fiera porti alies liberecon sur siaj sklavaj ŝultroj.

Tuj kiam aspiroj kaj ideoj kontraŭaj ekpenetras en la popolamasojn ; ekde kiam tiuj milionoj da laboristoj... ekpostulas por si mem ĉiujn homajn rajtojn kaj montriĝas inklinaj ilin konkeri se bezone per la forto, - tiu tuta sistemo de la burĝa liberalismo disfalas kiel ĥimerkastelo. Ĝia humaneco transformiĝas en furiozon ; ni ĝin vidis en Junio 1848, kaj ni hodiaŭ ĝin antaŭsentas ĉie ; ĝia respekto al la rajtoj de la proksimulo, ĝia kulto al la libereco lasas lokon al la kruelega subpremado. La politika liberalismo de la burĝoj malaperas, kaj ne trovante en si mem la necesajn rimedojn kaj forton por subpremi la popolamasojn, ĝi sin oferdediĉas profite al la konservado de la ekonomiaj interesoj burĝaj, kaj lasas lokon al la militista diktaturo.

"""""

...se la regantaj klasoj povus elturniĝi sen registaro, konservante nur la ŝtaton - nome la eblecon kaj la rajton ekspluati la popollaboron - ili ne tiel ŝanĝus la registaron. Sed la historia sperto - ekzemple la malfeliĉa sorto, kiu trafis la polan respublikon liberigitan de sia etnobelaro - montris al ili, ke estus neeble pluteni la ŝtaton sen registaro...

Sed kial registaro estas necesa al tenado de la ŝtato ? Ĉar neniu ŝtato povas sin teni sen <u>permanenta konspiro</u>, konspiro evidente direktita kontraŭ la popolamasoj, kies sklavigo kaj ekspluatado estas la ekzistopravo de la ŝtato. Kaj en ĉiu ŝtato la registaro estas nenio alia krom permanenta konspiro de la minoritato kontraŭ la majoritato.

Ĉia registaro havas duoblan tendencon, duoblan celon. Ĝia unua kaj ĉefa celo, ĝia celo konfesita, konsistas en antaŭsavo kaj plifortigo de la ŝtato, de la civilizacio kaj civilordo, t.e. la sistema kaj legalizita superregado super la ekspluatata popolo. La alia celo estas tute same grava antaŭ la okuloj de la registaro, kvankam malpli malkaŝe kaj malpli volonte konfesita ; ĝi estas la konservado de la propraj kaj ekskluzivaj avantaĝoj de tiu registaro kaj la plutenado de ties personaro. La unua celo kongruas kun la ĝeneralaj interesoj de la regantaj klasoj ; la dua kontentigas la vantecon kaj certigas esceptajn privilegiojn al la individuoj registaranoj.

Per sia unua celo la registaro lokiĝas sur pozicio malamika al la popolo ; per sia dua celo ĝi fariĝas malamika al la popolo kaj al la privilegiitaj klasoj ; estas eĉ momentoj en la historio, kiam la registaro ŝajnas fariĝi pli malamika al la posedantaj klasoj ol al la popolo. Tio okazas, kiam la posedantaj klasoj malkontentaj pri tiu registaro penas ĝin renversi, aŭ malpliigi ĝian povon. Tiam, la konscio pri memkonservo puŝas la registaron al forgeso de sia ĉefa celo, sia ekzistopravo : antaŭsavo de la ŝtato, de la superrego kaj bonstato de unu klaso, damaĝe al la popolo. Sed tiuj momentoj ne povas longe daŭri, ĉar registaro, kia ajn ĝi estus, ne povas ekzisti sen unu privilegiita klaso, kaj same ĉi-lasta ne povas ekzisti sen registaro.

## En la sama serio

****************

* Anarkio kaj organizo (Malatesta)
* La Bazoj de Anarkiismo (Balkanski)
* Durruti, simbolo de la hispana revolucio (Pario)
* Etiko I (Kropotkin)
* La Forto de la Fortaj (J.London)
* Homa animo sub socialismo (O.Wilde)
* Historia materiismo - Ĝeneralaj konsideroj pri la problemo de organizado (A.Pannekoek)
* La Parlamentisma Iluzio (C.A.Laisant)
* Inter Sovetaj Popoloj (Dikszteјn)
* La liberecana penso (citaĵoj)
* Liberecanaj vivkonceptoj (Fontaura) - En anarkista socio, kiel kondutos la individuo? (Jean Grave)
* Imaga dialogo Marks/Bakunin (Cranston)
* Memvola Servuto (La Boétie)
* Naciecaj problemoj (Roza Luksemburg)
* Nia Individuismo (E. Armand)
* Neperforta revolucio (T.Ebert)
* Parabolo pri la cisterno (E.Bellamy)
* La Rajto de Pigro (Paul Lafargue)
* Politika neperforto (M.A.N.)
* La Piramido de l'Tiranismo (Domela Nieuwenhuis)
* Revolucia registaro - Anarkista agado en la revolucio - La Pariza Komunumo (Kropotkin)
* Sindikatismo - Sovetoj (A.Pannekoek)

* Jenaj verkoj de Han Riner :
  - La Aperoj de Ahasvero
  - Individuismo en Antikveco
  - Individuisma Manlibreto
  - La Kvina Evangelio
  - La inĝenia hidalgo Miguel Cervantes
  - Veraj Interparoloj de Sokrato
* Jenaj tekstoj de E.Lanti :
  - Vortoj de Kamarado E.Lanti
  - La laborista esperantismo
  - El Verkoj de Lanti (du volumoj)
  - Ĉu Socialismo konstruiĝas en Sovetio?

* La individualisma socialismo de D-ro Axel Robertson Proschowsky (Lagalaure)

* kaj ceteraj...

Directeur de publication
& imprimeur : Chr. Baudé
F 47340 Laroque Timbaut.